6-a Jaro. N-o 288 APERAS  SEMAJNE Leipzig, 10./4. 1930

ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

KULTURA KAJ INTERHELPA ORGANIZO DE PROLET-ESPERANTISTOJ

REDAKTEJO: 14, avenue de Corbéra, Paris-12e
Gvidanto: E. Lanti

SIDEJO de Plenum-Komitato de SAT
23, rue Boyer, Paris-20e

ADMINISTREJO: Kolmstr. 1, Leipzig O 27
Administranto: R. Lerfiner

REMEMOROJ PRI ZAMENHOF

La datreveno de la morto de nia Majstro[1] memorigas min pri vizito, kiun mi faris al li somere en la jaro 1907 — la jaro de l' Ŝtutgarta (suda Germanio) Kongreso de l' 2-a Internacio, de 5-a bolŝevika kongreso en Londono k de Universala Esperanta Kongreso en Kembriĝ (Cambridge). Estis tempo de reakcio, kiu sekvis revolucion de la jaro 1905. Mi intencis forlasi Rusion kaŝe sen "permeso", t. e. sen pasporto, k deziregis utiligi la "okazon" por partopreni almenaŭ unu el la kongresoj. Unue trafi eksterlanden mi volis per germana limo k tial venis *Varŝavon,* sed tie mi rapide konvinkiĝis, ke la afero estus tro riska. Oni certigis, ke la limtransiro estas multe pli senĝena en Finnlando, kiu havis pli malseverajn regulojn por limpasantoj, ĉar estis kvazaŭ aŭtonomia parto de tiama Rusio. Tial en Varŝavo mi decidis nur viziti nian Majstron k poste veturi Finnlandon k pluen.



Zamenhof vivis en malriĉa proleta parto de Varŝavo, kion montras eĉ la nomo de lia strato *Dzika* (pole k ruse ĝi signifas sovaĝa). Mi facile trovis n-on 9 — kvaretaĝa ruĝbrika domego — k per korto venis al modesta loĝejo de nia Majstro en 2-a etaĝo (unua post la surtera). La loĝejo sin montris tre modesta: post sufiĉe malvasta enirejo ŝajne nur 3—4 negrandaj ĉambroj — kabineto (samtempe laborejo de okulisto), komforte tapiŝita saloneto kun remburitaj mebloj k ŝajne manĝejo k poste dormejo. Mi atendis vidi gravaspektan homon, sed antaŭ mi staris k min bonvenigis simpla, tre afabla mezaĝa k mezalta homo jam griziĝanta. Liaj portretoj tre similas lin. Kvankam esp-on, mi komencis lerni en fino de la jaro 1904, ja mi estis solulo k tute ne praktikis buŝan lingvon. Parolante mi tial faletis post ĉiu vorto, senĉese uzis la malbeligajn "tio ĉi", "tiu ĉi", unuvorte nian bęlan esp-on mi parolis kiel korvo najtingalas. Tial esperante mi esprimis nur komencajn salutfrazojn (antaŭe preparitajn!). Nia plua interparolo devis okazi vole nevole nur en rusa lingvo (ĉar hejmlingvo de ni ambaŭ). Mi sciigis, ke mi venis el Suda Kaŭkazio, kie esp-o, tiam jam komencis disvastiĝi.

— "Sonjo, venu ĉi tien, jen oni diras, ke esp-o jam penetris Sudan Kaŭkazion. Nia afero progresas! — ĝoje frotante manojn vokis la Majstro, turninte sin al pordo de apuda maldekstra ĉambro. Post kelkaj momentoj el la pordo aperis sufiĉe alta, maldika virino, brunulino kun paleta vizaĝo. Ŝi estis edzino de l' Majstro. Ni konatiĝis k daŭrigis interparolon pri senhalta triumfiro de esp-o tra la tuta mondo k pri venonta Kembriĝa Kongreso. La Majstro proponis veturi al la kongreso kune. Kun ĉagrenita koro mi respondis, ke mi ne sukcesis ĝustatempe aĉeti pasporton, sen kiu oni neniel permesos veturi trans limon, ke nun jam estas tro malfrue por klopodi pri la pasporto, ĉar ordinare en tiu tempo la ricevo de pasporto povis okazi nur post 1—2 monatoj (eĉ por tute "nesuspektindaj" homoj).

— "Eble vi iel sukcesos, vi provu, petu" — diris al mi la Majstro.

Mi respondis pri veturo tra Finnlando k ni interkonsentis revidiĝi en Kembriĝ.

Mi estis esperantisto-solulo, tute ne spertis buŝlingvon k tre interesiĝis pri meza prononco, kiun priskribis multaj lernolibroj. Zamenhof invitis min en sian kabineton, kiu troviĝis en apuda dekstra ĉambro. Rekte kontraŭ la eniro ĉe kontraŭa muro mi rimarkis marmoran manlavilon (evidente profesian okulistan). Maldekstre ĉe muro sub portreto de patro-pedagogo de l' Majstro staris negranda skribtablo. Preskaŭ tuta apuda muro estis kovrita de librobretoj aŭ libroŝrankoj, en kiuj mi sukcesis distingi (per surbindaj titoloj) nur kelkajn diversnaciajn vortarojn k (laŭ antaŭkonata al mi eksterajo) "Grandan rusan Enci-

[1] Zamenhof mortis en Varsovio je 14. aprilo 1917, dum la mondmilita apogeo.

klopedion“ . . . Ni sidiĝis ĉe la tablo k Zamenhof malkovris Fundamentan Krestomation, evidente ĉiam kuŝantan sur la tablo. La krestomation mi havis, multon el ĝi jam legis. Ĝis nun mi bone memoras tre simplajn, bonstilajn artikolojn pri lingvo internacia (de sennoma aŭtoro), pri eltrovo de Ameriko, pri moralaj suferoj de K. Kolombo k kelkajn aliajn, kiuj priskribis mokeman rilaton de la “mondo“ al novaj ideoj k inventoj. Ni ambaŭ kliniĝis al la libro. La Majstro komencis legi, iom haltis k diris:

— Prononcu la literon r nek kiel rusoj k italoj, nek kiel parizanoj, t. e. nek malkartavu, nek tro kartavu. Ni havu mezan prononcon . . .

Kliniĝinte mi rigardis la Krestomation k senkonscie salutridetis al konataj tekstoj . . . Subite mi sentis ian ekmovon en la Majstro, levis mian kapon k renkontis lian maltrankvilan rigardon, kaŝe esplorantan min el flanke tra siaj ĉiamaj okulvitroj . . . Kio okazis?

Muta interparolo

Tion, kio okazis dum kelkaj postaj momentoj, mi neniam forgesos.

Dum ĉi tiuj momentoj estis esprimita multe pli, ol dum tuta mia vizito.

Sed antaŭe mi devas averti la legantojn, ke en tiu tempo mi jam estis tute konvinkita k sincera adepto de lingvo internacia. Kvankam mi estis esp-isto solulo k kiel ĉiuj aliaj spertis ironian rilaton, eĉ mokojn de la “mondo“, sed mi estis juna k havis tute maloportunistan psikologion. Verdire tiam mi eĉ ne povis prezenti al mi konscian homon, kiu mokus progreson, des pli nian lingvon . . . Kiam mi, levinte la kapon, neatendite por la Majstro trafis lian rigardon, mi ekvidis en ĝi ian konsterniĝon, konfuzon, samtempe animan doloron k kvazaŭ iun domaĝon pro neceso reveni al malnova tedinta k doloriga temo. La Majstro kvazaŭ ekŝanceliĝis, ekcedis en iu fakte ne okazinta disputo. Lia rigardo kvazaŭ diris: “kiel multaj vi mokas min k opinias, ke ĉiu lingvo, kiu volas ekzisti k utili, devas esti natura k viva, sed ne artefarita de iu Zamenhof, *simpla* okulisto, eĉ ne lingvisto . . . Sed la afero estas *same* simpla! Nenio eksterordinara! Mi nur sintezis, kion mi sciis el homlingvoj! . . . Jen vidu, kiom simpla ĝi estas . . . Ni provu kune . . .“ (lia ĉi-momenta sinteno k ekmovo kvazaŭ montri volis la kuŝantan antaŭ ni Krestomation kiel simbolon de esp-o) . . . Evidente la Majstro rimarkis mian rideton k erare komprenis ĝian signifon ĉar li ne sukcesis el flanko bone distingi ĝin. Kiam li renkontis mian rerigardon, li komprenis sian eraron, lia rigardo trankviliĝis k kvazaŭ diris:

— Jen kia vi estas, mi opiniis malon! . . .

Evidente la Majstro multe suferis pro mokoj de la “mondo“. Tion klare esprimis la rigardo de liaj bluaj okuloj. Mi komprenis, ke mi nevole malkovris lian sekreton k animan vundon. La afero montriĝis tute intima k delikata. Ni buŝe diris pri ĝi ne unu vorton k eĉ penis ŝajnigi, ke mi ne rimarkis ĝin.

Ĉi tiu okazo komprenigis al mi multon el tio, kion mi legis pri modesto de Zamenhof, pri grandaj malhelpoj, kiujn li sola kontraŭstaris dum longaj, longaj jaroj.

Lia efektive eksterordinara modesto en la rigardo neatendite trafita esprimiĝis pli klare k senkaŝe ol povus esti buŝe elparolita de plej elokventa homo.

Sed ankoraŭ pli multon ĝi diris al mi pri tio, kion venkis la Majstro, enmondigante esp-on. Mi komprenis, ke geniecon de Zamenhof (same kiel geniecon de plej multaj aliaj grandaj inventistoj k pensuloj) oni devas mezuri ne per kompliko, malfacilo de iliaj eltrovoj k inventoj. Zamenhof nur sintezis, kion li sciis pri liatempaj precipe eŭropaj lingvoj, per esp-o li nur logike simpligis jam ekzistantan gramatikon de homlingvo. Geniecon de Z. oni devas mezuri per tiu fortego spirita, kiun li uzis por kontraŭstari al ĉiuj liatempaj aŭtoritatoj, el kiuj ne unu subtenis lin. Geniecon de Z. oni devas mezuri per tiu fortego, kiun li uzis por venki inerton k kontraŭstaron de socio, kiu ĉirkaŭis lin kiel oceano ĉirkaŭas solecan ŝipeton k kiu per miloj da voĉoj penegis sugesti, ke lia verko estas utopio k bagatelo. Mi komprenis, ke tragedio de genio estas neevitebla kontraŭstaro al la “mondo“ por bono de ĉi tiu mondo k, kiel sekvo neevitebla, soleco. Nur tiel lumita tute klariĝas al mi senco de la verso de l' Majstro “Mia penso“:

Mia penso k turmento,
K doloroj k esperoj!
Kiom de mi en silento
Al vi iris jam oferoj!
Kion havis mi plej karan —
La junecon — mi ploranta
Metis mem sur la altaron
De la devo ordonanta!

Fajron sentas mi interne,
Vivi ankaŭ mi deziras, —
Io pelas min eterne,
Se mi al gajuloj iras . . .
Se ne plaĉas al la sorto
Mia peno k laboro,
Venu tuj al mi la morto,
En espero — sen doloro!

Same sencoriĉa fariĝis al mi alia verso de l' Majstro, kiun mi antaŭe legis nur kiel lingvan ekzercon:

Ho, mia kor',
Ne batu maltrankvile,
El mia brusto nun ne saltu for . . .!

La majstro legis al mi ĉ. 2 paĝojn faris diversajn klarigojn k jene konkludis:

— Por ĝuste prononci vi nur penu legi tiel, kiel estas presite. Se estas presitaj *o* aŭ *e*, vi elparolu *o* aŭ *e*, sed ne *a* . . . Por perfektiĝi vi bezonas nur pli multe legi. Perfektiĝo k lingva sperto venos al vi mem kiel dum ekzercado en ĉiuj aliaj naturaj lingvoj . . .

Mi demandis, ĉu same facila estas esp-o por orientanoj, ĉinoj k japanoj?

— Prezentu al vi, — respondis la Majstro, — ke japanoj facile lernas esp-on!

Mi ĵus ricevis pruvojn pri tio. Mi tute ne scias iliajn lingvojn, sed prezentu al vi! . . .

Mi komprenis, ke esp-a vortaro bedaŭrinde ne atentis lingvojn de grandaj orientaj popoloj . . .

Mi pasigis ĉe la Majstro ĉ. unu horon, k adiaŭante repromesis revidiĝi en Kembriĝ. Sed, ho ve, mi sukcesis trafi ne eĉ unu el la tri supre cititaj kongresoj. Mi feliĉe pasis tra finnlandaj urboj *Abo* k *Marienham* en insularo de Balta maro[1] (en *Abo* — nun *Turku* — min helpis advokato *Leipola:* advokatoj tiam estis tre helpemaj!). Ĉe limoj oni traserĉis nur mian valizon. Sed en Göteborg (Svedio), kiam mi jam estis sur vaporŝipo ironta en Londonon oni postulis de mi krom bileto ankoraŭ garantian monsumon, kiun mi ne havis. Mi estis devigita ŝanĝi vojdirekton, vagis tra Eŭropo (Berlin, Kolonjo, Kopenhago, Lieĵ, Parizo k aliaj urboj). Pro manko da vivrimedoj mi revenis Kaŭkazion, tuj post la reveno estis traserĉata de ĝendarmoj k anstataŭ kongresojn trafis . . . Sibirion k poste eĉ dezertan Mongolion! . . . *Krjukov, Maks 79.*

[1] Baltoj estas loĝantoj ĉe Balta maro, ne nacianoj.

ATENTU, ANONCANTOJ! Se vi ne sendas viajn anoncojn sufiĉe frue al la Redaktejo (la monon al la Administrejo), vi ne povas atendi ĝustatempan plenumon de viaj petoj! Pripensu, ke K-doj el Japanio, Usono, Siberio ktp. ne plu havas okazon kontentigi vian deziron, kvankam ili tre volonte farus tion, se vi tro malfrue sendas vian anoncon. Tiuokaze ne riproĉu aliajn pro neefiko de via anonco, sed trovu la kulpon ĉe vi mem!

Dediĉu iom pli da tempo al verkado de viaj artikoloj, k vi certe sukcesos fari ilin pli mallongaj.

Ĉiu, kiu volas havi valoran dokumentaron pri kultura agado k celado en Sovetio,
aĉetu la novan SAT-broŝuron

SOVETA PEDAGOGIO
Multaj interesaj artikoloj de aŭtoritataj gvidantoj. **40 pĝ. Form. 16 × 25 cm.**
Prezo 0,50 mk. g.
Administracio de SAT, Colmstr. 1, Leipzig O 27.

LA POLITIKAJ PARTIOJ EN GRAND-BRITIO

En la jaro 1924 la formiĝo de l' unua laborpartia registaro estis apogata je revolucia ondo, kiu trenis kun si la tutan britian laboristan klason. La minista federacio, tiam potenca, estis preta komenci la decidan batalon kontraŭ la karbmin-posedantoj. Kelkaj venkaj strikoj signis la naskiĝon de l' Mkdonalda (Mac Donald-a) ministerio, en kiu la skota maldekstra alo kun Ŭitli (Wheatley) estis reprezentata. Normalaj diplomataj rilatoj estis senprokraste starigitaj kun Sovetio.

La ministerio de Mkdonald de 1929 estas la ministerio de l' refluo revolucia, la ministerio post la ĝenerala striko k malvenko de l' ministoj. La laboristoj, kiuj en 1926 iris plenaj je entuziasmo en la ĝeneralan strikon, estas hodiaŭ tiagrade senkuraĝigitaj, ke ili ne plu havas la forton kontraŭstari al la sindikat-gvidantoj, kiam ĉi tiuj decidas intertrakti kun la mastroj por ellabori interkonsenton, la kondiĉojn por daŭra socia paco.

La konsisto de l' nova ministerio spegulas ekzakte la okazintan ŝanĝiĝon. La skotaj maldekstruloj ne plu havas reprezentanton, dum la transkurintoj de l' liberalismo, kiuj aliĝis la Laborpartion dum tiuj lastaj jaroj, okupas firman pozicion.

La nova Ĉambro de l' Komunoj (parlamento) estas la unua, kiu estis elektata per la plena universala voĉdono, ĉar la virinoj havas nun kiel la viroj la voĉdonrajton je aĝo de 21 jaroj. La nombro da elektantinoj pasis de 9 al 15 milionoj, superante je unu miliono la virajn elektantojn. Tio estis la novo en la elektoj. Entute la virinoj voĉdonis kiel la viroj, laboristaj k burĝaj familioj kuniĝis ĉiu je sia flanko. La virinaj parlamentanoj kreskis nur je kelkaj unuopuloj — 69 kandidatoj, 14 elektitoj.

La elekta landkarto de Grand-Britio montras, ke tutaj regionoj estas nun akiritaj por la laborpartia movado. La ministaj distriktoj en Kimrio, Skotlando k Anglio. De longa tempo troviĝas minist-reprezentantoj ĉe la Ĉambro de Komunoj. Antaŭ ol la Labor-Partio fondiĝis, jam malgranda grupo da minist-deputitoj ekzistis, kiu ordinare voĉdonis kun la liberaluloj. Tiu ĉi grupo estas absorbita de la Labor-Partio k interne de la parlamenta reprezentantaro de tiu partio la ministoj formas nun kontingenton el pli ol 40 membroj. Kelkaj industriaj urboj, kiel Bermingem (Birmingham) k Londono, estis malfacile akireblaj por la labor-movado. En la lasta nun estas laborpartia plimulto, dum en la unua laborpartianoj k konservativuloj estas egale reprezentitaj.

Restas la kamparo. Tie la malvenko de l' Labor-Partio estis kompleta. Eĉ en la malriĉul-kamparanaj regionoj de okcidenta Anglio la Labor-Partio ne povis elektigi siajn kandidatojn; ofte ili eĉ devis pagi siajn laŭleĝe deponitajn 150 funtojn sterlingajn (garantimono). Se la konservativuloj tie perdis kelkajn sidlokojn, tio estis profite al la liberaluloj.

La Labor-Partio konsistis depost sia fondiĝo ĝis la milito el sindikatoj (*Trade-Unions*) k socialistaj organizoj: Sendependa Labor-Partio, Brita Socialista Partio, Fabiana Societo. Ĝi ne akceptis individuajn aliĝojn. Nur postmilite, kiam la parlamentaj progresoj faris el ĝi partion maturan por ekpreni la registaran povon k iuj liberalulgvidantoj emis rezigni je la liberalismo k fariĝi laborpartianoj, ĝi modifis sian regularon k akceptis individuajn anojn, por povi akcepti tiujn transkurantojn. Kompare tiuj individuaj anoj estas malmultnombraj rilate al la tuta membraro, sed la rolo ludata de ili estas neproporcia je ilia nombro: En la ministerio, kiu havas 19 anojn, ili estas 6.

La grandega plimulto da laborpartiaj deputitoj estas laborist-devenaj. Sindikatanoj-aktivuloj estas 126, inter ili 8 de l' Tutsindikatara Estraro (tri inter ili estas ministroj). Plej multajn deputitojn prezentas la ministoj, duavice sekvas la fervojistoj. Plej multaj estas sindikataj funkciuloj; nur malmultaj ankoraŭ laboris en sia metio, kiam ili estis elektataj. Inter la liberprofesiaj laborparti-deputitoj troviĝas 15 ĵurnalistoj, kelkaj kuracistoj k advokatoj, kelkaj mastroj aŭ eksmastroj, fine kelkaj ekleziuloj, apartenantaj al diversaj protestantaj eklezioj.

La sinteno de l' *komunistoj* rilate al la Labor-Partio estis longe diskutita dum la II. Kongreso de Komintern. La plimulto de l' anglaj delegitoj k sufiĉe granda nombro da alilandaj delegitoj estis kontraŭ peto al la Labor-Partio esti akceptata en ĝin same kiel la socialistaj organizoj. Lenin, nome de l' rusa delegitaro, estis por, k lia vidpunkto venkis. Ankaŭ lastjare, antaŭ la elektoj, la C. K. de l' brita kompartio preskaŭ unuanime konfirmis tiun vidpunkton. Sed la malplimulto ricevis la subtenon de l' Komintern-gvidantoj k en speciala konferenco estis akceptita deklaro de malkaŝa milito kontraŭ la Labor-Partio sub la agitvorto "klaso kontraŭ klaso!"

La kompartio penis prezenti kiel eble plej grandan nombron da kandidatoj por la elektoj. En 25 balotdistriktoj la komunistoj en 1929 havis kandidaton flanke de laborpartia kandidato. En la aliaj distriktoj la partio ne rekomendis libere la sindetenon, sed decidis konsili al la laboristoj voĉdoni por laborpartianoj nur, se tiuj "estus pretaj forlasi la kapitalistan programon de sia partio".

Ĉe la elektoj la komunistoj ricevis 50 614 voĉojn; la Labor-Partio pli ol 8 milionojn; la konservativuloj, proksimume la saman nombron k la liberaluloj pli ol 5 milionojn. La sola kom. deputito (Saklatvala) ne estis reelektita. 21 kandidatoj, ne ricevintaj 1/8 de l' esprimitaj voĉdonoj, devis pagi sian garantimonon de 150 funtoj sterl.

Mkdonald venkinte proklamis sian programon: Paca disvolviĝo de l' industrio, pac-spirito k konfidemo interne k ekstere. Tiuj promesoj estas dume skuitaj per krizoj en la ĉefindustrioj (karbo, metalurgio, teksado). En la sekvontaj jaroj Mkdonald sur la ekonomia kampo povos fari decidojn pezajn por la sorto de l' laborista klaso. Li povos faciligi la koncentrigon k raciigon en la industrio, aplikon de novaj metodoj de interkonsiliĝo pere de "miksitaj komisionoj" garantiantaj konstantan socian pacon. Ekster tiu grava demando la ministerio Makdonald nur havos malvastan agopovon.

Li povis en la komenco noti sukceson per konfirmo al la Vaŝingtona akordo pri la 8-hora labortago, kiu fakte en Anglio estas plej larĝe aplikata k solide bazita, ĉar la sindikatoj akiris k enkondukis ĝin. Nur malmultaj negravaj profesioj, kiel la podetala komerco, ankoraŭ ne ĝuas ĝin.

En la ekstera politiko Mkdonald restarigis la diplomatajn rilatojn kun Sovetio; li provis krei atmosferon pli amikecan kun Usono.

La Labor-Partio k la konservativuloj vidus tre volonte malaperi la *liberalan* partion. Sed por tio ekzistas malmulte da ŝancoj. Partio, kiu kolektis pli ol 5 milionojn da voĉdonoj, pruvas tiel, ke ĝi konservas seriozan socian bazon en la lando. Ĝia reprezentiĝo en la parlamento tute ne respondas al ĝia reala forto. Sed ankaŭ kun 50 ĝis 60 voĉoj ĝi povas resti la arbitro pri la politiko de la reganta partio k tiel ludi rolon sufiĉe gravan.

Ofte oni rimarkigis, ke la partioj rigore marksanaj aŭ simple tro teoriaspektaj ne havas estonton en Anglio. Kelkaj ekzemploj apogis tiun aserton. Depost la milito la *Sendependa Labor-Partio* atingis atentindan fortokvanton da 70 mil membroj. Kvankam ne rigore marksana partio, ĝi akcentis en lastaj jaroj klare sian programon pri efektivigo de l' socialismo. Ĝi forte kritikis la novan tendencon de l' Labor-Partiaj gvidantoj, kiuj pli k pli dekstriĝas por renkontiĝi kun la transkurintoj de l' liberalismo.

Bona verkisto penas eviti penon al la legantoj.

LA KONGRESEJO DE LA X-a

La X-a Kongreso de SAT kunvenos en halo, kiu havas centjaran historion malantaŭ si. Tiu estas *Conway Hall* (Konŭe Hal), la sidejo de la *South Place Ethical Society* (Sud-Placa Etika Societo). Tiu ĉi societo havas historion de progreso k evoluo, kiu estas interesa k laŭdinda. La Societo komenciĝis kiel religia sekto en 1824 el personoj jam progresintaj de ortodokso ĝis Unitarianeco (kredo en unu Dio; Jesuo = nur homo). Tiutempe necesis havi kuraĝon por dubi la ortodoksajn dogmojn, sed SPES konstante insistis pri la libero de penso. Konstante ekzamenante siajn kredojn, la SPES-anoj faris paŝon post paŝo, ĝis ili atingis forstrekon de l' vorto "Dio" el la Statuto. La Societo nun ekzistas por "kreskigi racian religian senton (sen dio!), studi etikajn principojn k progresigi homan bonfarton laŭ kreskanta scio". La agado konsistas ĉefe el lekcioj dimanĉe, ĉe kiuj povas paroli laŭ invito iu taŭga persono, kiu havas "evangelion". SPES insistis pri libero ne nur por si mem, sed oftfoje donis sian tribunon por la publikigo de malpopulara opinio. SPES ne necese ĉiam konsentis kun la parolanto, sed kredante je la principo de libera parolo ĝi malfermis siajn pordojn al personoj, kiuj estis elbaritaj aliloke. Eble la plej frua parolo por Hinda socia k politika reformo okazis tie. Dum la Angla-Bura milito en Sud-Afriko, tie oni povis aŭdi la veron, k tie oni publike protestis kontraŭ la enkarcerigo al pioniraj liberpensuloj.

La SAT-Kongreso ne estos la unua kontakto inter SPES k esperanto, ĉar estis esp. kurso tie dum kelkaj jaroj, k ankaŭ la malnova "Dimanĉa Rondo" regule kunvenis tie.

La kongresanoj, tamen, ne vidos la halon, en kiu tiom okazis. Se dum cent jaroj la Societo plifortiĝis, la konstruo kadukiĝis! La Societo tial translokiĝis de *South Place* ĝis *Red Lion Square* (Ruĝleona Placo), kie nun



staras tute nova halo, kiu je belo sed simplo, digno sed komforto ne estas superata en tuta Londono. Mi esperas, ke la kongresanoj senĝene ĝuos la kunvenojn en la komforta halo k flanka ĉambraro, k se ili ne vidos la malnovajn murojn, ili povas memori la malnovan tradicion pri libera parolo k penso, k kuraĝa alpreno de vero kiam trovita. *S. J. S. (11 883).*

En lando de senlaboreco, krizo k teroro

Neniam la ekonomia situacio en Polio estis tiel akuta kiel nun. La ekonomia krizo plej forte invadas la aliajn industri-sektorojn k minacas la landon per inundo da mizero k subpremiĝo. Ĉiuj jam klare vidas, ke la kvarjara ekzisto de la diktatora reĝimo de marŝalo Pilsudski puŝis la landon al ekonomia ruiniĝo k politika polica ĥaoso. Ĉiuj iluzioj k esperoj, kiujn dekomence ligis la popolamasoj kun la registaro de Pilsudski, renversiĝis. La laborista popolo fine ekkonis la rabobestan vizaĝon de la pilsudskianoj, k tio mem jam estas granda revoluciiga faktoro — rezultoj markiĝas plej klare k reliefe.

Polio estas de ĉiam lando de kontinua senlaboreco. Sed neniam tia stato kreskis kun tia kapturniga rapido kiel nun. En la pola registara gazetaro oni trovas pri la senlaboreco tiajn nombrojn, kiuj surprizas nin per sia rekorda kresko: en dumo de unu semajno (28. dec. ĝis 4. januaro nunjare) la nombro da senlaboruloj, kiuj ricevas subtenon, kreskis je 19 165 k en la dua semajno ĝi pligrandiĝis je pli ol 17 mil. Ĉiusemajne la nombro de l' pliiĝanta senlaborularo kreskas same. La ĝenerala nombro da registritaj senlaboruloj altas ĉ. 300 mil personoj. Dum la lastaj du monatoj la senlaboreco kreskis je 130%. Pro la daŭre kreskanta krizo multaj fabrikoj troviĝantaj en la ĉefaj industriregionoj, estas fermitaj. Kaj kiuj funkcias, tiuj laboras nur du aŭ tri tagojn semajne. La laboristoj, kiuj parte estas okupitaj, k estas certaj kandidatoj por senlaboreco, nombras centmilon.

Jes, tio estas sekaj faktoj k nombroj el la polia realo. Sed ili parolas per tia lingvo, kiu ekscitas vin, plenigas la koron je indigno k protesto al tia sociordo, kiu kondamnas milojn da vivuloj al malsatmorto. La socia malamo kreskas k la malkontento de l' amasoj atingas terurajn formojn. Mankas la tago, en kiu la gazet-kroniko ne notus okazojn de laboristaj tumultoj. En ĉiuj anguloj de la lando: Lodz, Varsovio, Bjalistok, Lvov, Sosnovice k. a. okazas laborist-manifestacioj, malpermesitaj ariĝoj, kie la laboristoj sentime, laŭte protestas kontraŭ la fia ekspluatado, polica teroro. En kelkaj lokoj la ekscitoj atingis tian gradon, ke la manifestaciantoj eĉ provis invadi la publikajn ejojn de labor-pero k fabrikajn kancelariojn. Kompreneble, ĉie la rajd-policistoj intervenis, batis k arestis multajn partoprenantojn, kiuj poste certe staros antaŭ la burĝa juĝejo kiel "agitintaj la popolamasojn kontraŭ la ŝtato".

Helan lumon ĵetas sur la cirkonstancojn regantajn en Polio la parolado de burĝa deputito d-ro Rozmarin, raportinta pri la buĝeto de l' justecministerio. Li diris, ke la malliberejoj en Polio estas tro plenigitaj, mankas lokoj por enpreni pli da arestotoj. La nombro da politikaj malliberuloj, laŭ lia diro, superas 10 mil. Fakte la nombro estas pli granda. Antaŭ 2 jaroj estis oficiale nur 6 mil personoj. La juĝistoj estas tro ŝarĝitaj per laboro, k la raportanto postulis pligrandigi ilian nombron k konstrui pli da malliberejoj . . .

Estas atentinde, ke la krimoj en Polio kreskas de jaro al jaro: En 1925 — 28 601, 1926 — 34 082, 1927 — 37 028. Ke la krimoj estas sekvo de malboniĝo en la ekonomia situacio de l' lando, pri tio neniu dubas. Tio jam estas delonge konstatita vero!


Ĉu estas espero, ke la ekonomia situacio en Polio senrevolucie pliboniĝu? Estas unu respondo: Ne! Kvar jaroj da faŝisma regado bone tion konstatis. Kaj ni provu lakone ekzameni la kialon: La polia industrio troviĝas en malhela angulo. Kvankam la 30-miliona loĝantaro konsistas el 65% da kamparanoj, kio normale kreas bonajn ŝancojn por kapitalisma disvolviĝo de l' industrio, kvankam la bezono estas kolosa, tamen la kamparanoj estas absolute mizeraj k ne povas esti la konsumantoj de poliaj industriaĵoj. Granda parto da ili estas malmultteraj aŭ senteraj. La grandaj terspacoj apartenas al la poliaj bienuloj k havigas al ili grandegajn profitojn. Kompreneble, la internacia krizo je agraraj produktoj pliakutigis la situacion. La pola laboristaro ankaŭ ne povas esti sufiĉa konsumanto de la fabrikaĵoj. Ĝia laborakiro estas statistike la plej malalta en la tuta mondo.

Restas nur, kiel ni vidas, la sola konsumanto de la polia fabrikaĵo la granda, kolosa senlaborula armeo. La aĉetpovo de la polia loĝantaro estas reduktita ĝis minimumo. La bruta

Diktaturo post diktaturo

Tiu, kiu kredas, ke en Hispanio denove regas normala stato, tute eraras. Finiĝis la diktaturo de Primo de Rivera, k generalo Berenguer anstataŭis lin. Oni diras, ke la nuna diktaturo estas ponto kondukanta al normala stato. Sed se ni studas k pripensas la aferon, ni tuj rimarkos, ke malmulte ni progresis k ke ĉio estas ago de l' reĝo por savi sian kronon.

Ne necesas esti talentulo por kompreni la nunan staton de l' hispana politiko. Frapokule oni vidas, ke monarkio havas tre malfortikan bazon k por ke ĝi povu vivi, estas necesa perforta reĝimo. Liberalaj k respublikanaj ideoj enfiltriĝis en preskaŭ ĉiuj cerboj, kvankam generalo Berenguer tion povas malkonfirmi. Oni konsideras monarkion kiel absurdaĵon, taŭgan nur por la muzeo de l' Historio. Kompreneble, reveno al normalo tuj kunportus pli da libero je la agado, k pro tio pli rektan kontraŭstaron al la reĝo. Sed ĉi tiu estas pli ruza ol vulpo k ne permesos normalon, ĝis li konsideros, ke monarkio ne estas en danĝero. Oni aranĝos baloton, en kiu, pere de koalicio k aliaj fiaj rimedoj, la monarkista partio havus grandan plimulton. Kaj tiam la hispana historio daŭros tiel absurde kiel ĝis nun.



La ĥameleona politikisto hispana, post la falo de Primo, serĉas novan koloron. (El Sol, Madrid).

Sed ni ne devas forgesi, ke Alfonso la XIII ne havas anstataŭontojn; liaj filoj estas nekuraceblaj malsanuloj. Eĉ se oni ne renversus la monarkion, ĝi ne plu daŭrus post lia morto.

Kiam disfalis la diktaturo de Primo de Rivera, la popolo ekĝojis, ĉar ĝi kredis, ke tiam ekkomenciĝis nova epoko. Malgaja iluzio! Spite la promesoj de generalo Berenguer cenzuro regas, ne tiel akre kiel antaŭe, ĉar oni ion devis fari por kontentigi la popolon, sed sufiĉe severe, por ke la idedisvastiĝado ne estu ebla. Politikaj kunvenoj estas malpermesataj k pro tio, kvankam preskaŭ ĉiuj hispanoj sentas liberalajn ideojn, ilia forto estas tre limigita.

La unua ago de generalo Berenguer, tuj kiam li atingis la povon, estis amnestii la enkarcerigitajn militistojn k permesi la revenon al kelkaj ekzilitoj. *Unamuno, Ortega y Gasset* k. a., ĉar sendube li opiniis, ke amnestiante k permesante ilian revenon, li akirus simpatiojn. Kaj li ne eraris. Momente la popolo laŭdis tian agon, sed tuj malkontento denove regis la spiritojn. Amnestio! Justo! Jen la krio de l' hispana popolo. Centoj da idealistoj restas putrantaj en karcero. Neniu laborista enkarcerigito estis liberigata. Katalunaj naciistoj suferas malliberon, kvankam la motivoj por ilia enkarcerigo estas konfuzaj k pridubindaj. Dum du aŭ tri semajnoj pli ol cent mil katalunaj virinoj subskribis manifeston petante al la nuna diktatoro vastan amnestion por ĉiuj politikaj aŭ sociaj enkarcerigitoj; sed la reĝo ne volas subskribi la liberigordonon. Jen la *reprezentanto* de l' popolo, kontraŭ la popola volo. Ĉu tiu stato povas daŭri?

Kun la nuna regsistemo, pli bone, kun monarkio, normala stato ne eblas. Ses jaroj da diktaturo estis doloriga, sed taŭga spertigilo, k dum ili la popolo evoluis al pli noblaj k altaj ideoj. Tiu, kiu ne evoluis, estis la reg-aparato. Tradiciaj institucioj ne havas ekzistrajton, ili estas senhonta absurdo, ili ŝanceliĝas, sed ne finfalas; mankas tiu, kiu kuraĝe puŝus ilin, por ke okazu la definitiva renversiĝo.

Hodiaŭ oni ekmalesperas, oni timas, ke la *ponto kondukanta al normala stato* tiel longiĝos, ke fino ne estos videbla. Ne povas esti aliel; ero da libero signifas fortan baton al monarkio, k kiel ni jam diris, nur perforto povas savi ĝin aŭ almenaŭ plilongigi ĝian ekziston. Pro tio la reĝo uzas ĉiajn rimedojn por konservi perforton.

Estas malpermesata la reorganizado de l' sindikatoj, k al laboristaro, sen gvidiloj, peliĝas laŭ la kaprico de l' ondoj. Resume: La hispana historio troviĝas en epoko de duboj k necertoj, dum kiu la plej sensignifa fakto povas okazigi long-efikajn okazaĵojn. *Estrak.*

---

konkurado kun eksterlando ankoraŭ pliakrigas la situacion de la polia produktado. Pro tio ne estas mirige, kiam la fabrikoj fermiĝas, en la komerco abundas bankrotoj k la mizero kreskas en la tuta lando k ĝiaj bruantaj ondoj atakas la fundamentojn de l' polia kapitalismo. Malgraŭ tio, la nuna regna buĝeto (akceptita unuanime de la regnofidelaj partioj ĝis polaj socialistoj) por jaro 1930/31 estas pli granda ol antaŭjare. Pli ol 37% elspeziĝas por la armeo. Tio necesas por teni en timo la ribelantan popolon k sufoki en sango ĝian flaman indignon pri la burĝa ordo. *Maks Ŝpetrik.*

K-doj, kiuj peros al nacilingvaj lab. gazetoj ĉi tiun artikolon, bonvolu alsendi pruvekz-ojn al la aŭtoro (en Berezno).

Silvio Gezel (Gesell) mortinta

Unu el la plej distingaj intelektuloj, unu el tiuj, kiuj donis al la proletaro klaran bildon pri la kapitalisma ekonomio k montris bonan vojon al la emancipo, ne plu vivas. Silvio Gezel (Gesell), la kreinto de la fiziokrata (liber-ekonomia) teorio, mortis la 11-an de marto en Berlino, kelkajn tagojn antaŭ sia 68-a naskiĝtago, pro grava pulminflamo. Ĝis siaj lastaj vivsemajnoj li ankoraŭ aktive partoprenis en la movado poremancipa, k liaj lastaj verkoj montris ankoraŭ neeluzitan vivemon k batalemon.



Kion la proletaro perdis en li, ne estas esprimebla per kelkaj frazoj; sed tiuj, kiuj konas lin k liajn verkojn, mem povas juĝi pri tio. Li postlasis al ni, batalema k liberiĝema proletaro, grandiozajn verkojn pri ekonomio k politiko. Lia teorio pri libera ekonomio (fiziokratio) estis ignorata de la laborista gvidantaro, k pro tio la plejmulto el la klaskonsciaj laboristoj ankoraŭ hodiaŭ ne scias ion pri li k liaj laboroj. "Antaŭ ĉio la vero k klaro", tio estu nia bataldevizo. Se la klaskonsciaj laboristoj batalus laŭ ĝi, nenia ekonomiteorio, neniu politikisto povus esti ignorata de ili. Ĉiu teorio devus esti studata de proletoj liberiĝemaj, k estus elĉerpata el ĉiuj la plej bono, ĉar ĉiu doktrino havas siajn bonojn bezonatajn por nia batalo.

Ni opinias, ke Silvio Gezel, tiu eminenta intelektulo, ne plu vivanta hodiaŭ, ne estas forgesebla, ke ekviviĝos lia teorio pri libera mono k libera grundo. Same kiel la nomoj de Karlo Marks k Lenin post ilia morto pli ofte estus uzataj, ankaŭ la nomo de S. Gezel ankoraŭ ofte sonos el la buŝoj de proletoj. Ni kiel liaj disĉiploj plej bone honoros lin per tio, ke ni konigos lian teorion al la tutmonda proletaro.

SAT-ano 6707.

Esperanto-Servo

N-o 28 — 4-a jaro Gvidanto k kompilanto: O. BÄSSLER, Ebermayer-Str. 8, I, Leipzig C 1 (Germ.) 10. Aprilo 1930

EL FRANCIO

Proletaj k burĝaj feministinoj

194 (Esp.-Servo.) La delegitinoj de la francaj feministinoj ĉeestis en Parizo la 22-an k 23-an de marto la Nacian Kongreson Feministan. Verdire ĉeestis multaj delegitinoj, sed plejparton formis nelaborantinoj, advokatinoj, doktorinoj, beletristinoj. Do tiu kongreso ne elmontris klaskonscion — aŭ pli bone, tiu klaskonscio estis pure burĝeca. Tion oni spertis, kiam delegitinoj prezentis rezolucion, en kiu ili petis "plenan kunlaboradon" inter feministinoj k sindikatoj, kiam temos pri la sorto de l' laborantinoj. Reakciaj feministinoj, kiel Maria Verone (Marja Veron') akre kritikis tiun rezolucion k ankaŭ la Amsterdaman Internacion Sindikatan; k fine la rezolucio estis akceptata kun redaktŝanĝoj, kiuj senigas ĝin preskaŭ de ĉia valoro k efiko. Aliflanke la kongresanino, K-dino Germaine Fauchère (Ĵermen' Foŝer) estis akre atakata pro prifeminista artikolo, de ŝi publikigita en la sindikata ĵurnalo "Le Peuple" (La Popolo). Ŝi deziris kontraŭbati la atakojn k komencis oratori, sed la kongreso ne eĉ permesis al ŝi eluzi la 4-minutan tempon, kiun ŝi rajtis. Kial? ... Ĉar i. a. ŝi diris: "iaj feministinoj neniam estis salajrataj, sed ili volas zorgi la laboristinojn ... por ia dandismo, ne konsiderante ke ili estas sen ĉia sperto pri laboristinaj aferoj ...". Pli k pli la proleta k burĝa feminismoj diferenciĝas.

F. Chamarre, La Rochelle.

EL URUGVAJO

Ligo por "helpo" al enmigrintoj

195 (Esp.-Servo.) Komence de februaro 1930 fondiĝis en Montevideo la "Liga Estranjero" (ligo de enmigrintoj). La programo de tiu ligo estas tre interesa. Ĝin povas aliĝi ĉiuj naciemuloj k religiemuloj; ĝi donas al siaj anoj laboron, senkostan kuracadon k advokaton. Kelkaj laboristoj vizitis la ligon k petis pro laboro, dirante ke ili alvenis en la urbon antaŭ kvar monatoj, sed ĝis nun ne trovis laboron k eĉ devis vendi siajn vestaĵojn por povi aĉeti manĝaĵon. La prezidanto de tiu humana ligo respondis al la laboristoj, ke nur tiuj povas ricevi laboron, kiuj jam aniĝis k pagis la aliĝan kotizon de 0,75 peso. Sed la koncernaj laboristoj nur povis diri al li, ke ili momente eĉ ne havas moneron por aĉeti panon k promesis tuj pagi la kotizon post ricevo de la unua salajro. Tamen senrezulte ili devis forlasi la prezidanton de tiu "helpa" ligo. — Plej klare montriĝis la rolo de la "Liga Estranjero" dum striko de laboristoj en la viandfabriko "Svift", kiu okazis meze de februaro. Per afiŝoj hungarlingvaj la ligo alvokis la hungarajn enmigrintojn senlaborajn, anonci sin ĉe la liga prezidanto por ricevi laboron. Ni nun eksciis, ke la ligo ricevis po strikrompanto certan sumon! La prezidanto de la ligo estas d-ro Skaroni, estinta deputat-kandidato. Li nun tre penadas, por ke dum nova baloto li povu esti kandidato de "Liga Estranjero"; li volas "reprezenti" la "interesojn" de enmigrintoj en la parlamento (?!). — La 23-an de februaro la ligo aranĝis vesper-kunvenon, kiun ĉeestis i. a. la germana konsulo k la ministro-konsilanto de Urugvajo. Dum tiu ĉi vespero ili laŭdis la malaperintan kapitanon de la subakviĝinta vaporŝipo "Monte Servantes". Kompreneble oni ankaŭ diskutis pri estontaj agoj kontraŭ "ribelantaj" laboristoj. En proksimaj monatoj la ligo volas aranĝi varbmanifestaciojn en la urbo. — La enmigrintaj proletoj en Urugvajo senpacience atendas la tempon, kiam ili povos malaperigi tiun homvend-ligon.

13 827, Montevideo.

EL RUMANIO

Registara krizo en Rumanio

196 (Esp.-Servo.) La fido de la amasoj al la "demokrata" nacivilaĝana registaro Maniu de tago al tago malpliiĝas. Ne nur la laboristaj amasoj ne fidas ĝin, sed ankaŭ la burĝaro ne konsentas al ĝi. Kiam meze de marto okazis "soveta militagado por invadi Besarabion", veturis opozicia generalo en Besarabion por studi k konvinkiĝi pri la vera stato, sendepende de registaraj informoj. Tion eksciis la ministroprezidanto Maniu k deklaris sian abdikon al la regento, kiu ne akceptis ĝin. Dume la opoziciaj partioj jam alianciĝis por formigo de koncentra registaro, kies programo estu: 1. akiro de eksterlanda monprunto; 2. sekureco de interna ordo; 3. senindulga kruemilito kontraŭ komunistoj!

Role.

Nova atako de la faŝista diktatoro

197 (Esp.-Servo.) En Rumanio legala sfero por la kompartio ne ekzistas jam depost 1929. Sed malgraŭ ĉio precipe nuntempe la kompartio disvastigas siajn ideojn tiugrade, ke la registaro timas danĝeron por la regno. Pro tio oni preparas novan kontraŭkomunistan leĝon, kvankam tiaj leĝoj jam ekzistas k la sola revolucia organo jam en aprilo 1929 estis nuligita. Laŭ la nova leĝo nun ankaŭ tiuj estu punataj, kiuj okupas sin pri komunistaj teorioj, sendepende ĉu ili aktive agadas por tiu movado. Plue la nova leĝo konstatas, ke la komunismo ĉiuforma estas peko, do ne nur la politika, sed ankaŭ sociekonomia k kultura. Fine oni ankaŭ volas nuligi la "blokon de urbaj k vilaĝaj laboristoj"; per tio oni forrabos ankaŭ la lastan legalecon de la subpremata popolo. Sed ...!

Role.

Raportojn por ĉi paĝo sendu senpere al Leipzig!

EL LITOVIO

Faŝista surprizatako

198 (Esp.-Servo.) En nokto, duono antaŭ la unua, 5 faŝistaj banditoj surprizatakis nian K-don Stasys Riĉkus en lia loĝejo. Ili grave vundis lin ke eĉ li ne povas ellitiĝi. Inter la faŝistaj banditoj estis gimnazi-instruisto el urbo Radviliŝkis.

Esp-isto.

EL POLIO

Mobiliz-provo ...

199 (Esp.-Servo.) Iun tagon en marto okazis en Lodz pormilita mobilizprovo. Subite, sen antaŭanonco, policistoj kaptis virojn el fabrikoj, desur la strato k el privataj hejmoj. Pro la grandega mizero en la urbo la mobilizprovo estis fiasko. La parencoj de la enkazernigitoj amasiĝis antaŭ la kazernoj k kriis: "redonu al ni niajn edzojn"; "redonu al ni niajn filojn"; "donu al ni panon por niaj infanoj"; "ni ne permesos al niaj edzoj, pafi kontraŭ niaj fratoj"; "vi jam sufiĉe elsuĉis nian sangon". Policistoj volis forpeli ilin, sed la amaso eĉ ne unu paŝon iris malantaŭen; ili kriis: "mortigu nin, ni tamen ne foriros". La enkazernigitoj, vidinte tra la fenestroj ke la policistoj batas kelkajn virinojn, rompis la vitraĵojn k ĵetis al la policistoj. La mobilizprovo daŭris tri tagojn.

Rob. Oel.

EL GERMANIO

Por komunistaj redaktoroj malliberejo

200 (Esp.-Servo.) En daŭro de kelkaj monatoj oni ĵetis 30 redaktorojn de komunistaj gazetoj malliberejon. La lasta estis la redaktoro Vencel (Wenzel) de la komunista gazeto "Popolĉo" (Volksecho). La juĝistaro kondamnis lin pro preparo de landperfido k disigo de la regna gvardio al 15 monatoj da mallibero. La juĝistaro i. a. komentis: "la akuzito meritas eksterordinaran punon, ĉar lia metio estis forĝisto k li per propra forto, per vizito de komunista partilernejo alproprigis al si tiom da scio, ke li klare konas la celojn de la komunista internacio k persone aktive kunagadis por ties efektivigo". Konklude: ĉiu laboristo, kiu per sia scio batalas en intereso de la proletaro, meritas laŭ juĝo en germana "libera" respubliko eksterordinare kruelan punon ...

10 596, Nieder-Salzbrunn.

SENNACIULA SCIENC-KULTURA PAĜO

N-o 25 Sub la kontrolo de Scienc-Kultura (Akademia) Sekcio de SAT. Redakci-adreso: Dim. Snejko, Minsk, Poŝtkesto 33 (Sovetio) N-o 25

De l' Redakcio

Ĉi sube ni publikigas artikolon pri ISIS. Ni konsideras ĝin kiel tre gravan k petas niajn kunlaborantojn propagandi la ideojn de ISIS inter kulturaj k sciencaj laboristaj organizoj.

Esperanto je la servo de scienco

Laŭ interkonsento kun la Internacia Scienca Asocio Esperantista ISIS Org. K-to transprenis la centrajn preparajn laborojn por funkciigo de ISIS. Ĝi turnas sin al vi kun insista peto, transpreni la organizadon de ISIS en via lando aŭ transdoni ĉi tiun taskon al alia kompetenta samideano. Ĉar temas pri unu el la *plej gravaj k seriozaj praktikaj* peresp-aj entreprenoj, ni petas ne prokrasti vian respondon.

ISIS estos *tutmonda organizo,* kies tasko *estos ebligi per sia aparato, nur uzanta esp-on,* plej *rapidan interŝanĝon de scienc-teknikaj diversfakaj novpublikigoj,* informoj k materialoj inter la sciencaj institucioj k gazetaro de diversaj landoj.

La neceso por tia entrepreno estas evidenta al ĉiu scienclaboranto, kiu konas la lingvajn malfacilojn k la tedan ĥaoson, tempoperdon en la interŝanĝo de diversnaciaj publikigoj.

ISIS estos bazata ne sur nura idealismo de la kunlaborantoj, sed havos financan bazon — la priservatoj pagos al la oficejo, k la oficejo pagos al la kunlaborantoj.

ISIS havos jenan konstruon:

Internacia Patronada Komitato konsistanta el esperantemaj scienculoj diverslandaj. Tasko: morala apogo de la laboroj.

Centra Oficejo (en Berlin). Tasko: peri la esp-igitan sciencan materialon al la landaj filioj. Organiza centro. Interrilato kun internaciaj institucioj. Centra kaso.

Landaj Oficejoj (en ĉiu lando unu). Tasko: peri la tutan materialon ricevatan al la landaj sciencaj gazetoj k institucioj. Peri la tradukaĵojn el la landaj sciencaj gazetoj al la centra oficejo. Varbo de landaj fakaj kunlaborantoj. Enkasigo de la mono k pagoj al la kunlaborantoj. La landaj oficejoj laboras en laŭebla kontakto kun ISAE-delegitoj k esp. scienc teknikaj grupoj.

ISIS funkcios tiel: La landaj oficejoj havos konstantan aron el espistaj kunlaborantoj de diversaj fakoj, kiuj porpage kontrakte transprenas la necesajn fakajn tradukojn en k el esp-o k donas la necesajn fakajn informojn. La distribuo de la laboro k la rilatoj kun alilandaj ISIS-oficejoj okazos nur per la landaj oficejoj, kiuj konsistos el estro, sekretario, kasisto k aliaj laŭnecese (samloka aro da personoj!). Ili havos la adresaron k la kontakton kun la landaj kunlaborantoj. Ĉiu servomendo estos akceptata nur per la landa oficejo kontraŭ pago; el ĉi tiu mono ioma parto restas por la skrib- k preselspezoj de la landa oficejo, alian parton ricevos la kunlaboranto, farinta la servon, k trian parton la centra oficejo por siaj elspezoj. Ĉio estos fiksota inter la koncerna landoficejo k centra oficejo.

La Centra Oficejo regule eldonos informilojn kun ĝeneralaj sciigoj por la landaj oficejoj. La informpetojn akceptos nur la Centra Oficejo.

La *interŝanĝo* de aŭtoraj resumoj el diversnaciaj sciencaj gazetoj okazos tiele, ke la interesiĝantaj redakcioj de ĉiu aperanta originala novpublikigo sendas nacilingvan resumon de la aŭtoroj aŭ de la redakcioj mem (ne pli ol dekono de la original-artikolo) al la landa ISIS-oficejo; ĉi tiu tuj tradukigas la riceviton en esp-on per la faka kunlaboranto. Poste la maŝinskribita traduko estu sendata senprokraste al la Centra Oficejo. La C. O. (Centra Oficejo) daŭre multobligos la ricevatajn tradukojn k dissendas ilin regule al ĉiuj landaj oficejoj. La lastaj per siaj fakuloj tradukigas la materialon en la nacilingvon. Ĉiu resumo estu ĉiam skribita sur aparta slipo. La laŭfake ordigitaj nacilingvaj slipoj estos sendataj al la enlandaj redakcioj, kiuj havas intereson k pagas ilin.

La unuaj taskoj de la ISIS-organizo: 1. Kreo de landaj iniciativaj komitatoj, el kiuj konsistos la Internacia Patronada Komitato; 2. kreo de landaj oficejoj kun diversfaka kunlaborantaro; 3. organizado de internacia interŝanĝo de originalaj artikolresumoj el scienca gazetaro.

Via konkreta tasko: 1. Dissendu al la esperantemaj scienculoj en via lando cirkuleron kun peto aliĝi *nedevige* al via nacia iniciata komitato por ISIS; ekzemple vidu la cirkuleron, sukcese dissenditan en Germanio[1] 2. Dissendu je la nomo de tiel kreita komitato aŭ je la nomo de ia alia aŭtoritata organizo *neesp-a* al ĉiuj gravaj sciencaj k teknikaj revuoj en via lando cirkuleron (kiel modelon vidu germanan cirkuleron) kun informo pri ISIS. Vi devas mem decidi, ĉu estas en via lando oportune jam nun mencii, ke temas pri peresp-a entrepreno, ni preferas tion fari nur post sukceso. 3. Ĉar ni jam havas pozitivajn rezultojn ĉe profesoroj k redakcioj en Belgio, Francio k Germanio, ni ne dubas pri sukceso ankaŭ en via lando, sekve por ne perdi tempon, nepre tuj komencu krei vialandan oficejon de ISIS, kiun vi gvidos. Certigu al vi kunlaborantojn, po unu el ĉiu fako, k la sekretariaron, laŭeble ĉiuj en via urbo (se neeble, vi devas nature aligi aliajn). 4. Senprokraste skribu, kiu el vi transprenas la gvidadon de la oficejo vialanda, k se vi ne povas, al kiu vi transdonis tiun ĉi laboron, krome informu nin pri la konsistiĝo de la iniciata komitato de ISIS, de la landa oficejo k pri la respondoj de la redakcioj al via cirkulero. Ĉiujn detalajn informojn pri la organizo vi laŭ deziro ĉiam ricevos de ni. Esperante ricevi baldaŭ vian jesan respondon, ni salutas samideane

H. Muravkin (Scienc-Kultura Sekcio de SAT), *H. G. Spiegel* (Ekstera Sekcio de Esperantista Rondo Akademia Berlin). — Adreso: ISIS, *H. G. Spiegel*, Berlin N 65, Müllerstr. 158/59, *Germ.*

[1] Havebla ĉe ISIS-oficejo.

ISIS sukcesas . . .

Laboroj de la organiza komitato:

Laŭ alvoko en esp. gazetaro por anonco de kunlaborantoj aliĝis 25 personoj el 9 landoj. La alvokon represis laŭ nia scio 7 gazetoj.

La laboroj de la organiza komitato k la kreo de la centra oficejo estis ebligataj per la grava teknika k financa helpo de firmo Wittenberg, Berlin.

Ni dissendas cirkuleron por fondo de landaj oficejoj al 40 landoj. Per ili ni instigas ankaŭ cirkulerojn informajn al la redakcioj de sciencaj k teknikaj gazetoj por organizi la interŝanĝon de aŭtorresumoj. Same instigo je kreo de iniciataj landaj komitatoj, konsistontaj el esperantemaj profesoroj.

Publikigo de artikoloj pri ISIS en esp. gazetoj.

Sukceso en la landoj

Belgio: S-ro Vandevelde dissendis cirkuleron al 9 gazetoj k ricevis 4 jesajn respondojn.

Francio: S-ro Rollet de l'Isle dissendis similan cirkuleron al la franca scienca k teknika gazetaro. Rezulto laŭ provizora sciigo kontentiga. Prof. Dejean-Grenoble surprenos la provizoran gvidadon de la landa ISIS-oficejo.

Germanio: Ekstera Sekcio de la Esp. Rondo Akademia en Berlin dissendis cirkuleron al 20 profesoroj; 6 aliĝis al la proponita iniciata komitato, parte ankaŭ el Aŭstrio. Aliĝis la profesoroj Grotjahn (socia higieno, Berlin), Schneickert (juro, Berlin), Kohlschütter (geofiziko, Potsdam), Schumann (elektrotekniko, Vieno), Wegener (geografio, Graz) k simpatias Szegö (matematiko, Königsberg). La landan oficejon gvidos s-ro Spiegel, Berlin.

Al cirkulero sendita al 72 redakcioj respondis jese 20, maljese 10 k indiferente 5.

Sovetio: La scienckultura sekcio de la tutregna "Societo po kulturaj rilatoj kun eksterlando" dissendis cirkulerojn al sovetiaj scienculoj por krei iniciatan landan komitaton de ISIS. Ĝi ankaŭ konsentis funkcii kiel sovetia filio de ISIS.

TRA ESPERANTIO

Pri la Afiŝekspozicio Sovetia en Usono

Kiel ni povas pruvi al la neesp-ista proletaro, ke la lab. esp-ismo estas nepre bezonata parto de nia klasbatalo, kiel ĉiuj kulturmovadoj? Ni revoluciaj SAT-anoj devas cerbumadi pri novaj vojoj k manieroj, per kiuj ni pli kontentige, aŭ nur ni per nia peresp-a laboro povos plenumi difinitajn bezonojn de la proletara klasbatalo. Gazet - informservado, lab. korespondado, salutleteroj, flaginterŝanĝoj, k. a. similaj peresp-aĵoj estas certe bonaj pruvoj pri nia servemo. Sed aliflanke oni pruvas al ni, ke ni ne eltrovis ion novan, ĉar la supre menciitaj servoj estas jam delonge praktikataj oficiale k neoficiale per div. naciaj "mondlingvoj". Se ni ne eltrovos ian novan vojon utilan, sed malsimilan al tiuj uzataj de nacilingvemuloj, nia kontraŭularo ne ĉesos malfavori k riproĉadi nin pro tempomalŝparo por tute ne- aŭ ne tre necesa movado. Nia tasko estu trovadi novajn kampojn de lab. kulturmovado, kiujn ne ankoraŭ povis tuŝi praktike la neesp-ista laboristaro.

Antaŭ nelonge, ĉi tie en Novjorko, nia Esp. Rondo, nia tuta laboro, dum longa tempo estis tre malfavorata de la plimulto el la laboristoj. Nia diligenta gazetservado ne multe helpis, ĉar nia gazetaro k ties legantaro ne rimarkus evidentan mankon, se nia perespa informservo eble ne funkcius. Tiele nia simpatiantaro kreskas nur tre malfacile.

En la pasinta oktobro mi ricevis 6 revoluciajn afiŝojn el Sovetio. Mi tuj fiksis ilin sur muron en la halo de nia Laborista Hejmo. Centoj da gelaboristoj vizitas tiun halon tutan tagon. Post kelkaj tagoj mi denove ricevis 3 tre belajn afiŝojn de iu Sovetia K-do. La interesiĝo pri la afiŝoj estis tre granda k kreskis daŭre. Oni ofte demandis: "El kie ili venis?", "Kiu sendis ilin?", "Al kiu oni sendis ilin?". Ni respondis: "El Sovetio, de la tieaj esp-istoj por nia Esp. Rondo". Ni povis tuj rimarki iometan ŝanĝiĝon en la malfavora sinteno de nia fanatika kontraŭularo. Ĉe tiu konstato, nia Rondo ekhavis komunan ideon: aranĝi ekspozicion de Sovetiaj afiŝoj. Ni anoncis en "S-ulo" k krome ni proponis al nia multnombra korespondantaro sovetia interŝanĝi tieajn afiŝojn revoluciajn kontraŭ deca rekompenco. Sovetiaj Gek-doj tre kontentige plenumis nian peton, k iom post iom ni ricevis ĉ. 80 div. afiŝojn, kies plej granda parto estis vere belega artpresita produkto. Ĉiu libera parto de la muro de nia granda halo estis kovrata per ili. Enmeze ni lokis grandan anoncon nacilingvan: "Ĉiuj ĉi afiŝoj estas senditaj de la sovetiaj esp-grupoj al la N. Jorka Esp. Rondo." Ĉiu vizitanto devis sciiĝi, ke nia ekspozicio estas peresp-a laboro. Antaŭe oni neniam aranĝis tiaspecan ekspozicion en Novjorko nek alie en Usono. Do, nia vere malmulta aktivularo esp-ista plenumis servon, kiun la neesp-istaj laboristoj tute ne aŭ nur tre malfacile povus plenumi. La nombro de nia kontraŭularo pli k pli malkreskas, ili silentas aŭ favoras nin; ni nun povas aranĝi kursojn kun pli da sukceso. Pro la pliboniĝo de l' situacio mi varbis ĉ. 12 Gek-dojn al SAT k ne malpli da abonantoj por "S-ulo".

Centoj da poresp. artikoloj ne povus krei pli favoran atmosferon por la lab. esp. movado, ol tiu brile sukcesinta afiŝ-ekspozicio. Nia plano estis: migrigi la materialon de unu lab. klubo al la alia, k fine ankaŭ al tiuj en la provinco. Tiun planon ni jam parte plenumis. Duoble aŭ pli mult-ekzemplere ricevitajn afiŝojn ni tuj sendis al lab. kluboj en provincoj. Nun reale ne ni petas la permeson por nia ekspozicio, sed la neesp-istaj gvidantoj de multaj lab. kluboj senpacience urĝigas nin por aranĝi ĝin en ilia klubo. Nature, ni atentigis ilin, ke ili tute ne bezonus nian helpon, se en ilia klubo troviĝus almenaŭ 1—2 esp. K-doj. Nia situacio iĝis vere inversa kompare al nia antaŭa malfavora stato.

La sovetia afiŝaro meritas specialan intereson ne nur pro sia propaganda efiko por la klasbatalo proletara, sed ankaŭ pro sia belartaj desegnoj k preso. Profesiaj artistoj vizitis nian ekspozicion por lerni novajn manierojn, ideojn de la sovetiaj pentro- k pres-artoj, ĉi tie preskaŭ ne konataj. Bildoj de afiŝoj estas pli frapantaj, sekve multe pli interesaj, ol la peresp-aj informoj. Ni povas rekomendi al lab. esp. grupoj ĉie en la mondo aranĝi similan ekspozicion. Nature, la ekspozota materialo devas esti nepre rekompencata al la sendintoj.

Per ĉi tio mi volas informi la sovetian esp-istaron, ke ne tre taŭgas sendi eksterlanden la statistikajn afiŝojn, kiuj estas plenaj je multaj nombroj amaso da %-oj k cirilliteraj klarigoj pri la progreso de sovetiaj industrio, terkulturo k. a. Por deĉifri ilin eksterlande oni bezonas tradukanton. Krome, ili ne estas tiel frape efikaj, kiel la aliaj. Afiŝoj de IRH kontraŭalkoholaj, kontraŭreligiaj, pri industria progreso, pri farmkolektivo k ankaŭ landkartoj kun perbildaj klarigoj bonege efikas. La plej imponaj afiŝoj estas la kontraŭmilitaj, tiuj de la Ruĝa Armeo k tiuj eldonitaj por revoluciaj datrevenoj. Estas tre dezirinde, ke la afiŝoj estu *stampitaj de la sendonta grupo kun plena adreso. Krome oni skribu kelkvortan klarigon esp-e sur la afiŝo.* (La rusa lingvo estas duoble malkomprenebla pro la konservita cirila literaro.)

Ni devas nepre mencii, ke la plej belan afiŝon sendis al ni K-do Zirjanov el Kurgan, Siberio. N-o de lia afiŝo estas: Glavlit — 98 508. Titolo: "Estu akrevidemaj. Gardu la akiraĵojn de la revolucio." Tiu bildo montras: Ruĝa soldato kun 2 laboristoj starantaj sur imaga landkarto de Sovetio, akre observas la landlimon. Eldonis: Osodviahn. La dua plej bela k verŝajne plej arta el ĉiuj estis granda afiŝo kun Lenin-bildo sendita de K-do Jefremov el Kuzneck. Reproduktita kolorbildo de la fama pentristo M. A. Verdov. Tio estis nia juĝo, k ankaŭ tiu de la rigardintaro. Cetere, oni vere havis malfacilan taskon por elekti la plej belan el la ekspozita materialo.

Nun ni estas pli riĉaj per novaj sperto k metodo, ĉar nia peresp-a afiŝekspozicio akiris al ni respekton k favoron, per ĝi ni certe varbis multajn geamikojn por Sovetio.

SAT-ano 29, Novjorko.

Ni akceptas — — — eĉ sprite verkitajn artikolojn.

PLIA OPINIO PRI NIA GAZETO

Kun granda miro mi legis la noton el la Redaktejo en "S-ulo" n-o 282. Evidentiĝas el tio, ke ekzistas SAT-anoj, kiujn ne kontentigas nia asocia organo, pro motivoj, kiujn mi tute ne povas aprobi. Laŭ la cititaj eldiroj de K-do 11 321 la enhavo de "S-ulo" ofte ne estas interesa k aliaj legaĵoj superas "S-ulo"n. Ŝajnas al mi, ke K-do 11 321 tre bezonas tiom valoran edukilon, kia estas nia gazeto, ĉar lia klaskonscio ŝajnas esti nur malgranda k pro malflegado ĝi ja tute ne kapablas pligrandiĝi.

Pri "S-ulo" mi havas alian opinion. Al mi ne mankas sufiĉe da tempo por legi k studi ĝian enhavon. Laŭ mi, ĉiam oni trovos iomete da tempo por legi nian semajnan gazeton, kies enhavo devus interesi ĉiujn aktivajn SAT-anojn. Komparu ian ajn nacian gazeton kun "S-ulo"; vi tuj konstatos, kiom da bagateloj svarmas en ĝi, por plenigi la paĝojn.

Male, la enhavo de "S-ulo" estas bone elektita k kontraŭe al la eldiroj de K-do 11 321 tre instrua. Eĉ en la simpla rubriko "Nia poŝto" pensema SAT-ano povas kolekti spertojn.

Verkante artikolon, oni bone atentu, ke la enhavo ne nur estu interesa por la verkanto, sed prefere por la cetera legantaro. Certe, 8-paĝa "S-ulo" ne sufiĉas, 1. ĉar taŭgaj artikoloj aperas nur post longa temp-interspaco, same la diverscelaj paĝoj; 2. tiel estas malhelpata vigla, rapida interŝanĝo de instruoj, spertoj k opinioj; 3. tio kaŭzas malstreĉiĝon de l' energio, necesa por antaŭenpuŝi nian movadon. Kiam mi multfoje legis red. rimarkon pri neakcepteblo de artikoloj pro ilia longo k spacomanko, mi sentis grandan bedaŭron, ĉar eble taŭga artikolo aŭ ne aperas, aŭ nur en tro konciza formo. Por spacoŝparo koncizo estas taŭga, sed ne ĉiam por la kompreno de l' leganto. Pro ne sufiĉa kompreno aŭ eĉ miskompreno la intereso por nia afero ĉe iuj malpligrandiĝas iom post iom, ĝis fina malapero.

Ni streĉu ĉiujn fortojn, por ke "S-ulo" restu edukilo, la plej bona el inter la diversspecaj. Daŭra 12-paĝa gazeto estas progreso. Ni subtenu nian gvidantaron, iomete ebenigante la vojon per pozitiva kunlaborado. Al K-do 11 321 mi konsilas: "Pli racie disponu pri via tempo por ke ĝi ne manku al vi, kiam ajn vi deziras legi 12-paĝan 'S-ulo'n!"

Jos. Broglin (14 103).

La jarkunveno de Hungaria Eperantista Societo Laborista

La 23-an de marto kunsidis la delegitoj al la jarkunveno de HESL. Ĉeestis 49 delegitoj el 11 budapestaj k 13 provincaj grupoj. Mankis nur delegitoj el 4 provincaj grupoj. La tuta daŭro de l' kunveno atestis pri la konstanta evoluo de la lab. esp.-movado Malfermis K-do S. Tieder, la prezidanto. Li konstatis, ke la movado, malgraŭ la tre malbonaj ekonomiaj cirkonstancoj de l' laboristaro, ĉiam pliampleksiĝas k tion oni ŝuldas ankaŭ al helpo, kiun ĝi ricevas de l' socialdemokrataj ĵurnaloj, sindikatoj k partio. Poste li skizis la gravajn taskojn de l' kunveno, salutis la reprezentantojn de div. lab. organizoj-socialdem. partio, soc. juristoj, lab. Infanamikoj, lab. alkoholkontraŭuloj, sindikatoj de modelfaristoj, komizoj, barbiroj, k delegitojn de aliaj esp. societoj. Li menciis, ke la Intersindikata Konsilantaro, la Asocio de Lab. Ĥoroj k Turista Societo "Naturamikoj" ne sendis delegitojn, ĉar samtempe okazas ankaŭ ilia jarkunveno. Estis legataj salutleteroj de multaj LEA-oj k de SAT.

K-do Halka konigas la nombrojn pri pasintjara laboro. La societo havis je 31. 12. 1929 1397 membrojn (1926), aranĝis 114 kursojn por komencantoj kun 1828 p. (86 k. 1432 p.), 12 progres. kursojn. La bibliotekoj societaj enhavas 2260 librojn k estis uzataj en 1443 okazoj (2153 l., 1343 o.). La plejparto el la membroj estas organizitaj laboristoj. Pasintan jaron fondiĝis kvar novaj grupoj, fondotaj estas baldaŭ 7 grupoj. Li mencias la daŭron de l' polica persekuto. Motivo de malpermeso je grupfondo, ekz., estas: "la laboristoj apenaŭ scias la hungaran lingvon, do ne estas supozeble, ke ili serioze volas lerni fremdan lingvon". En pasinta jaro aperis 32 artikoloj priesp-aj en la sola socialdem. tagĵurnalo k 19 artikoloj en aliaj soc. gazetoj. Propag. broŝuro estas disvendita en 2000 ekz., gramatiko en 1850 ekz. La oficiala gazeto aperis okfoje.

K-do Czitron prezentis la kasraporton, laŭ kiu la societo havis pasintjare P.[1] 6400,22 da enspezoj. El ĝi estis el *urba subvencio* 1200,— P. Plej grandan sumon elspezis la societo por sia ejo, poste por propagando, gazeto, instruado, provinca organizado. La kasostato pro la granda senlaboreco estas malbona. K-do Bleier raportis pri la librovendejo, kiu spezis pasintan jaron P. 8600,—. El ĝia profito pagis la societo la oficiston, donis por propagando 170,— P. k por grupbibliotekoj 245,— P.

La jarkunveno reelektis prezidanto K-don S. Tieder, elektis vicprezidantoj E. Langfelder k G. Zachár, sekretario F. Farkas, kasisto T. Czitrom, protokolanton k kontrolantojn, krome anojn de la centra komitato.

La jarkunveno plialtigis je 8 fileroj la monatan kotizon k decidis eldoni estonte la oficialan gazeton "Antaŭen" en presita formo, almenaŭ ĉiun duan monaton.

La jarkunveno unuanime akceptis jenan rezolucion:

"La societo petas la gvidantaron de la Socialdem. Partio k la redakcion de Népszava, ke ili komencu esp.-kurson en la dimanĉaj n-oj de l' ĵurnalo Népszava. Samtempe alvokas la jarkunveno la atenton de l' esp. laboristoj pri tio, ke la ĵurnalon Népszava, kiu estas la sola presorgano de la klasbatala laboristaro en Hungario k la sola tagĵurnalo, kiu ĉiam subtenas la klopodojn de nia movado, ili helpu plej forte kaj en ĝia intereso senlace agitadu."

Sekvis la akcepto de la nova statuto, kiun la jarkunveno akceptis en la formo proponita de la C. K. k en kelkaj detaloj ŝanĝita de la speciala jarkunvena komisiono.

Post la trakto de interpelacioj K-do Tieder per entuziasmaj vortoj fermis la kunsidon. Li alvokis la delegitojn partopreni ankaŭ en la politika k sindikata batalo de la laboristaro, agitadi por la partia gazetaro, ĉar "ankaŭ nia movado ne estas izolita de la cetera parto de l' lab. movado. Ju pli floras la ĝenerala lab. movado, des pli da sukcesoj ni povos atingi."

[1] Pengojn.

Suplemento al la adresaro en Jarlibro

(Tiu ĉi nomaro ne estas por korespondemuloj)

(4-a daŭrigo. Vidu n-on 284/87)

Minsk (Sovetio)
15799 **Adlivankina R.*, ploŝĉad Svobody 13 kv. 15.
Mojajsk (Mosk. okr., Sovetio)
15788 **Tarnorudova M.*, Gorodskaja apteka.
Mooschwiller le Bas (Haut-Rhin, Francio)
15593 *Gross A.*, rue de Mulhouse 15, oficisto.
Moskvo (Sovetio)
15941 *Deev D.*
15560 *Filippov N.*, M. Bronnaja 6 kv. 1.
15479 **Gurova L.*, Arbat 51/4, — 2, desegnistino.
15561 **Klavs E.*, 3 Sokolniĉeskaja 10 kv. 15, — 14.
15792 *Kojevnikov P.*, B. Ĥaritonievskij per. 6 kv. 1.
15720 *Mineev B.*, B. Kamenŝĉiki 17 kv. 15, — 4.
7764 **Pipkina A.*, Gogolevskij bulv. 29 kv. 36, dentkuracistino.
3402 *Robiĉek P.*, B. Dmitrovka 22 kv. 13, poŝtisto.
15555 *Tumanov V.*, Durasovskij 9 kv. 1.
Mousseau par Lèves (Eure et Loire, Francio)
7822 *Gautier Ch.*
Mücheln (Germanio)
15735 *Kästner H.*, Wenden 32, ĉarpentisto.
Mühlbach b. Bischofshofen (Aŭstrio)
15798 *Gardelko R.*, Mitterberg, tekn. oficisto.
Mulhouse (Francio)
15857 *Dietsch A.*, rue de Habsheim 1.
15594 *Lieby E.*, Colonie Haller 31, Dornad.
Nancy (Francio)
13985 *Kaercher G.*, Nouveaux Abattoirs.
Naro-Fominsk (Sovetio)
15715 *Oficerkin P.*, Volodarskaja 69.
New York (Usono)
15936 *Brody D.*, Esp. Rondo, 350 East 81 st. Str., City.
15626 **Geizer M.*, 350 East, 81 st. Str., City, peltistino.
15627 *Juhász St.*, 350 East, 81 str. Str., City.
15625 *Kolk V.*, 350 East, 81 st. Str., City.
12824 *Oholiav M.*, 260 Watkins St., Brooklyn, City, studento.
15935 **Weinberg E.*, 511 East, 79 th Str., City.
Niĵni-Novgorod (Sovetio)
15883 *Markov P.*, Tiĥonovskaja 42/3.
Nimes (Gard, Francio)
15783 *Caucanas E.*, rue Becdelièvre, fervojisto.
15881 *Crouzeau*, rue Nationale 44.
Novosibirsk (Sovetio)
15898 *Kirillov P.*, Bolŝevickaja ul. 2-a kv. 8.
15597 *Kostenko G.*, Sovetskaja ul. 53-a, statistikisto.
15596 **Vaseva R.*, Nadeĵdinskaja ul. 45 kv. 2, lernantino.
Nürnberg (Germanio)
15763 *Eckardt K.*, Siegfriedstr. 4.
Nynäshamn (Svedio)
15758 *Södergren K.*, Centralgatan 64.
Odense (Danio)
15643 *Borg E.*, Kanallivej 35, buĉisto.
15642 *Sörensen K.*, Engvej 48/1, helpanto.
Odessa (Sovetio)
15945 *Ŝiring A.*, Sadovaja str. 17/15.
Olkusz (Polio)
15875 *Wajcman A.*, Krakowska 23.
Örebro (Svedio)
8621 *Vallin O.*, Bromsgatan 4.
Oslo (Norvegio)
6971 *Eilertsen J.*, Poŝtkesto 407, ferlaboristo.
15731 *Erlandsen H.*, Toiengt. 17.
15732 *Skjolberg O.*, Toiengt. 37.
15730 *Sundsby M.*, Halfdans Vei 24, Lille Toien.
Oybin b. Zittau (Germanio)
15931 *Deutscher K.*, Bahnhofstr. 1-d.
Pavillons s./Bois (Francio)
15682 *Lechain G.*, 6 allée E. Zola, juvelisto.
Philadelphia, Pa. (Usono)
15729 *Perlow M.*, 2601 S, 8th Str.
Pirmasens (Germanio)
15607 *Schantz J.*, Pestalozzistr. 93, pentristo.
Pjatigorsk (Severnij Kavkaz, Sovetio)
15925 **Reren H.*, ul. Urickaja 45.
Pless (Ivanovsk. obl., Sovetio)
15856 *Pestrjakov L.*, ul. Urickogo 28.
Plymouth (Britio)
15906 *Rickard C.*, 61 West Down Rd., Swilly.
Plzen (Ĉeĥoslovakio)
15948 *Dolák J.*, Plánska str. 2, — 4.
15871 *Plzák J.*, str. 3, Ŝkvrnany, tipografisto.
15768 **Ŝilhankova M.*, Sladkovského 29, kudristino.
15870 *Sedlaĉek J.*, Bendova 32, modellignaĵisto.
15618 *Ŝtekl K.*, Tichá str. 5, — 9, seruristo.
Podorajnaje (Sovetio)
4535 *Skirta M.*, Kremenĉuga distr.
Poltava (Sovetio)
3373 **Fridman L.*, Ĉernonoarmijska 17.
Praha-Bubeneĉ (Ĉeĥoslovakio)
15947 *Slavik Fr.*, 447 Uralski nam., oficisto de koop.
Pugaĉev (Niĵne-Volĵsk. Kr., Sovetio)
15580 *Baskakov A.*, Sovetska ul. 93.
Reĉica (Blankrusio, Sovetio)
15711 *Mnuĥin G.*, str. Soveta 98.
Rehau (Bavario, Germanio)
15619 *Hahn K.*, Adlerstr. 35, ledlaboristo.
Rennes (Ile et Vilaine, Francio)
15604 *Fernando J.*, rue Dupont des Loges 67, stud.
Rikovo (Artem. okr., Sovetio)
15786 **Navrocka*, ul. Sverdlova 372 kv. 18.
Rockford (Usono)
15640 *Malmquist V.*, Seventh Str. 602, tornisto.
Rothenbach (Silezio, Germanio)
15919 *Berger J.*, Nr. 135 fervojisto.
Rotterdam (Nederlando)
15757 *D. v. Kwawegen*, Goudscheweg 88-B, masonisto.
Saga-ken (Japanio)
15612 *Muta-Nobutaka*, Karatsu-machi, Joonai-nishinomonkoji.

(Daŭrigota)

TRA LA ESPERANTA GAZETARO

Gazetoj de l' Malproksima Oriento

Parolu ni ĉi-foje pri la gazetoj, kiuj estas eldonataj en la Malproksima Oriento. Se ni juĝus la movadon laŭ la nombro da tie aperantaj gazetoj, ni devus paroli pri tre prospera esp. vivo en *Japanio*. Sed kelkaj el la tie aperigataj "gazetoj" estas ne pli ol cirkuleroj por mallarĝa rondo da interesatoj, kiel "Libero", eldonata de iu studenta grupo en Kioto, aŭ "Revuo Kultura", eldonata tre malofte de proletaj studentoj en Japanio. Kelkaj el tiuj aperaĵoj ekvivas, ŝanceliĝas, malaperas. Oni vidis ilin unu, du fojojn, k poste ili ne plu venas, perdiĝas el vido k memoro... Sed aperas almenaŭ du grandaj monataj revuoj en Japanio, kies longjara aperado permesas konkludon, ke ilia ekzisto estas certigita: *La Revuo Orienta* k *Esperanto* (antaŭa "Esperanto en Nipponlando"). Tria, samformata, bele prezentita: *La Esperantisto* estas malregula aperaĵo, k longajn monatojn oni ne vidas ĝin, ĝis subite ree eliras en la mondon kelkaj n-oj. Ankaŭ unu el la supre nomitaj firme bazitaj gazetoj, *Esperanto,* trapasis ŝajne krizon lastdate, ĉar dum la periodo de septembro ĝis decembro 1929 aperis nur unu simpla kajero. El la fakto, ke multe da japana teksto enestas tiujn revuojn, kiu ĉefe servas por klarigi gramatikon k vortuzon, evidentiĝas, ke nur kun granda malfacilo japanoj lernas eŭropajn lingvojn (inkluzive esp-o). Krom informoj pri la movado ne mankas literaturaĵoj. Ankaŭ la recenza parto pri esp. literaturo estas bone prizorgata en tiuj revuoj. *Verda Mondo,* kiu aspektas simile kiel la antaŭe nomitaj revuoj k eliras regule monate, enhavas nur literaturon facile legeblan kun klarigoj en japana lingvo. Evidente ĝi estas imagata kiel perfektigilo lingva por la Oomoto-entuziasmuloj, kies laŭdoktrina devo estas ellerni esp-on. Ĝi aperas en la sama eldonejo kiel la religia *Oomoto-revuo* kun sia stereotipe en ĉiu n-o ripetata apoteozo al la "Sankta Sinjoro Deguĉi" per foto en plej diversaj pozicioj k sintenoj de tiu grasvizaĝa religi-ĉefo. Ni ne povas kompreni, en kio kuŝas la magia forto de liaj profetaj vortoj, kiuj estas tiom vulgaraj k neorginalaj, neniel superaj al la Bibliaj stultaĵoj. (La eŭropa propagand-revuo de tiu movado presiĝas 5000-ekzemplere! Signo, ke mono por disvastigo de tia entrepreno ne mankas!).

En Ĉinio aperas la *Verda Lumo,* oficiala organo de *Ŝanĥaja* Esp. Asocio. La kajero de jan./feb. enhavas artikolon "Azio por azianoj", en kiu la aŭtoro, pastro Seriĉev, unue asertas, ke la tero apartenas al ĉiuj homoj, ke devizo "Azio por azianoj" estas ridinda same kiel estas ridindege paroli pri "sankta posedrajto" de terpartoj, nomataj "regnoj" en la jarcento de plioftigataj interrilatoj k vekiĝo de tutmonda proletaro. Tamen li opinias necese *pledi* nuntempe *por* la "Azio por azianoj", ĉar hodiaŭ en Ameriko k Eŭropo oni aplikas la principojn de l' Monroe-doktrino. Do oni agitu por tio, kion oni ekkonis ridinda! Pastra logiko! — Cetere la enhavo de l' revuo estas parte ĉinlingva, parte instrua (per facila legmaterialo kun paralelteksto ĉinlingva).

Aliaj centroj de esp. movado ne ekzistas en Malproksima Oriento, krom en la Apudpacifika parto de Sovetio (Ĉita — Vladivostok). Sed tie ne necesas propra revuo, ĉar kiel propaganda gazetoj iras tien la SEU-organoj, dum "S-ulo" ligas la tieajn K-dojn kun la okcidenta mondo. *N. B.*

KUN TIU ĈI NUMERO ESTAS EKSPEDATA "LA NOVA EPOKO" ★

TRA LA MOVADO

(Kroniko)

BRITIO. Leeds. Ĉi tie fondiĝis "Virina grupo" de SAT. Perantino: Annie King. — *ESTONIO.* K-do Tuiman raportos en la 4-a jarkongreso de Junsocial. Asocio (13./14. aprilo) pri esp-o. La kongreso antaŭvideble decidos favore por esp-o, ĉar jam en multaj sekcioj de l' Asocio esp. kursoj okazas de du jaroj. Por ke la decido estu pli efika, pri la sukceso interesitaj personoj k organizoj sendu salutlet. al: *Eesti Noorsotsialistliku Liidu Kongress,* Tähe 13, *Tartu,* Estonio. — *FRANCIO.* En la Ain-departemento pluraj personoj enskribiĝis por la kurso perletera. La grupo de Béziers havas 15 membrojn, inter ili 12 SAT-anoj. En Clermont-Ferrand grupo re-formiĝas. La grupo en Grenoble nombras 14 membrojn, kiuj partoprenas aktive la movadon. En Lyon vigla agado, nova kurso por lernantoj k studentoj sub gvido de K-do Kam. Ru. En Montchanin (industria urbeto) grupo formiĝas. Ankaŭ en Rennes grupo estas fondota post fino de kurso 8-membra. — *GERMANIO. Königsberg.* Aktivaj SAT- k LEA-anoj laboras por disvastigi esp-on ankaŭ en la provinco. Kunvenoj regule okazas ĉiumerkrede. La du lab. gazetoj publikigas ofte esp. angulojn kun gazetserva materialo. Peresp. koresp. kolektiva funkcias ĉe Ruĝa Virinunuiĝo (RFMB), ILH k lab. padelsportanoj. Peranto restas K-do 2241. (Willi.) — *HISPANIO. Madrid.* Funkcias 6 kursoj inter laboristaro. Ĵus malfermiĝis du kun 10 k 30 lernantoj, ĉiuj laŭ "Petro". Venontjare ni esperas havi 18 SAT-anojn. Antaŭ 3 jaroj ekzistis ĉi tie nur 1 SAT-ano. (10 502.) — *LATVIO.* 30. 8. 29 la Riga-a socialdem. gazeto publikigis ĉefpaĝe sub titolo "miskompreno aŭ vandalismo" protest-artikolon kontraŭ malpermeso al SAT-eldonaĵoj (inkl. "S-ulo"), konigante samtempe al siaj legantoj strukturon, celon, taskojn de SAT k ĝian eldonagadon. — *SOVETIO. Orel.* Dum febr. K-do Lingel tralegis 12 lekciojn pri esp-o. Organiziĝis ankoraŭ unu rondeto el 42 lern. en la 6-a laborlernejo. (5087.) — *SVEDIO. Helsingborg.* La 13. 3. parolis en popoldomo antaŭ 300 p. nia aŭstria K-do R. Frey (14 922) pri Vieno k Aŭstrio. La parolado estis aranĝita de ABF k esp. klubo. Frey estis sendita kiel ofic. reprezentanto de l' aŭstria registaro por propagandi turismon. 8 kursojn vizitas ĉ. 150 p. Gazetoj k organizoj favore atentas. (11 509.)

ĈE LA NEŬTRALULOJ

La 31-an de marto s-o prof. Th. Kar (Cart), prezidanto de la Esp. Lingva Komitato k Akademio, festis sian 75-an naskiĝtagon. Tiuokaze La Internacia Centra Komitato de l' Esp. Movado transdonis al li la Honormedalon de l' ICK.

*

La hinda esp-isto Lakŝmisvar Sinha legis en Svedio dum sia rondvojaĝo antaŭ 25 mil personoj. Sume estis lastjare en Svedio 50 mil aŭskultantoj ĉe esp-lingvaj paroladoj. Ĉ. 15 mil personoj komencis studi esp-on. Miloj da artikoloj pri esp-o aperis en svedaj gazetoj. 50 geinstruistoj je ŝtataj kostoj estis instruataj. Estas proponita ŝtatigo de la novorganizita Sveda Esp. Instituto. Fondiĝis esp. turista komisiono por aranĝi libertemp-vojaĝojn per esp-o. En Stokholm okazas oficialaj kursoj por tramistoj k telefonistinoj (laŭ Ĉe-metodo).

*

La Lyon-a Radiostacio aranĝis konkurson, por refuti la aserton, ke diversnaciaj esp-istoj ne povas facile interkompreniĝi. Parolis antaŭ la mikrofono ruso, germano, hungaro, francino. polo. El la 144 aŭskultintoj respondintaj la plej lertaj konkursantoj trovis nur du naciecojn, kio pruvas al la publiko, ke la argumentoj de l' kontraŭuloj pri malsama prononcado estas senbazaj.

*

Pola zoologia profesoro esp-ista d-ro Dybowski mortis je 31. 1. en Lvov. Li estis bone konata en fakaj sciencaj rondoj. Li partoprenis aktive la polan ribelon kontraŭ la cara registaro en 1863 k vivis 12 jarojn en ekzilo en Siberio.

*

La registaro de l' princlando Liĥtenŝtajno decidis aperigi poŝtkartojn kun bildoj pri tiu pentrinda lando. Laŭ la ekzemplo de aliaj landoj la klariga teksto de la vidaĵoj estos skribata, krom en germana, en esp. lingvo.

MEMORNOTO

Represis el "S-ulo":

Le Travail, Genève, 20. 2., kiel Ford ekspluatas (279); *Uj Elöre,* Novj., 13. 2., esp. traktoro (Ivnicki); *Der Republikaner,* Mulhouse, 10. 3., spertoj de radiotelegr. (274); *L'Effort,* Lyon, 22. 3., kapit. ignoras landlimojn; *Pravda Severa,* Arĥang., 4. 1., paco sur tero (273), 19. 1., Fratoj-hung. (275), 8. 2., kiam mi estis en mallib. (277); *Komsomolec,* Arĥang., 5. 1., Sekvoj de telorismo (258), Malsatstr. Hung. (267), 20. 1., Esp. traktoro (275).

Represis el "La Lern.":

Echo d. Ostens, Königsb., 20. 2., artik. en gaz. (1926).

Priesper. artik. k notojn enhavis:

Viking, Los Angeles, 8. 3.; *Königsberg. Volksztg.,* 1. 3.; *Nieuwe Rotterd. Courant,* Rotterd., 11. 3. (Ĉe); *Signalen,* Stokh., 13. 3., 20. 3.; *Accion Cooperatista,* Barcel., 14. 3.; *Kieva Pioniro,* 28. 2., 9. 2., 19. 2., 9. 3. (kurso); *Daily Worker,* London, 17. 3., 22. 3. (rubr.); *L'Effort,* Lyon, 15. 3.; *Reformatorn,* Stokholm, n-o 4; *Lokomotivm. Tidning,* Stokh., 15. 3. (rubr.); *Renovacion,* Madrid, 15. 3.; *Vangarda Operaria,* Porto, 9. 3.

Pri SAT-Kongreso raportis:

Schweiz. Allg. Volksztg., Zofingen, 8. 3.; *Berner Tagwacht,* Bern, 21. 3.

Peresper. materialon enpresis:

Uj Elöre, Novj., 15. 2.; *Echo d. Ostens,* Königsberg, 8. 3.; *Königsberg. Volksztg.,* 17. 1., 6. 2., 27. 2.; *Pravda Severa,* Arĥang., 3. 1., 4. 1., 7. 1., 13. 1., 15. 1., 19. 1., 20. 1., 25. 1., 30. 1., 31. 1., 8. 2., 17. 2., 25. 2.

Atentigo! K-doj metu sur siaj leteroj al la Redakcio ĉiam siajn nomon k adreson!

NIA POŜTO

13 969. — Ni uzos vian manuskripton siavice.

Herta N. — Ni uzos vian artikolon, kvankam la red. prilaboro postulas multe da peno, pro via malklara verkmaniero.

2105. — Vian informon al la Leningr. K-doj ni povus enmeti nur kiel pagitan anoncon. *Red.*

10 502. — La reprodukto de la skribsignoj postulas kliŝigon (kiu estas sufiĉe kosta). Sekve ni enmetos nur noton pri via prop. ŝanĝante la tekston.

Nenionfarulo. — En tia polemika formo ni ne povas enmeti vian alvokon por konkurado. Cetere, estu trankvila, ĉiu aktivulo bone scias pri via multfaruleco. *E. L.*

2978. — Via anonco kostas 12 mk. g. Sumon ni skribis al konto.

15 410. — Fr. gaz. ni ne plu povas peri. La senditan sumon ni kreditis al vi.

9966. — Via anonco kostas 6,— mk. g.

Al kelkaj. — La manuskriptoj por "LNE" (marto) nur ricevita la 30./3. Pro la prokrasto ne kulpas la Adm., sed la redaktoro en Moskvo. *Adm.*

KORESPONDADO

Unu enpreso: Simpla trilinia anonco kostas 0.80 mk. g., ĉiu plia linio 0.50 mk. Ni nur akceptas anoncojn kun samtempa pago. L = letero, PK = poŝtkarto, PI = poŝtkartoj ilustritaj, PM = poŝtmarkoj, bfl. = poŝtmarko sur bildflanko, kĉl = kun ĉiuj landoj, esp-aĵo = esperantaĵo. Ĉiuj petantoj pri korespondado havas la devon, nepre respondi almenaŭ unu fojon al ĉiuj petoj koncernantaj la fakon, por kiu ili sin enskribigis.

FRANCIO

K-do Z. Fisz (25 j. fraŭlo), *Metz* (Moselle) 42, rue Dupont des Loges, kĉl pri div. temoj, interŝ. PI bild. k gazet. ilustr., precipe kun sovetianoj. Resp. garantiata.

GERMANIO

K-do F. Hentschel, Vorsetzen 6, *Hamburg-3,* interŝ. PM kun Sovetio, ankaŭ donas PI por PM.

K-do Karl Vieregge, Kossfelder Str. 14, *Rostock,* sendas kontraŭ 100 div. PM eksterl. saman kvanton da germanaj, PI.

K-do Alfred Schenk (18 j.), Grünstr. 6, *Merkstein,* Kr. Aachen, kĉl, PI, fotoj, krom Sovetio, precipe kun K-dinoj. Resp. garantiata.

K-do Rudolf Irmer (ŝuisto), Pestalozzistr., *Dohna/Sa.,* kĉl pri ĉ. temoj, L, PI.

— SAT-rondeto serĉas seriozan korespadon kĉl pri ĉ. temoj, L, PK, PI. Adr.: K-do Daniel Fiŝer, Pirmasenser Str. 94, *Kaiserslautern i. Pfalz.* — Resp. garantiata.

HISPANIO

K-do Moreno Francisco, Ripalda 15, bajo, *Valencia,* nur PI, kĉl. Estu certaj pri nepra ricevo de unufoja resp.

NEDERLANDO

K-do W. Wessels, de Wittenstraat 7/I., *Amsterdam (W),* pri kontraŭmilitarismo.

SOVETIO

K-do Nikolao Krilov, ul. K. Marksa 16, *st. Labjaĵja,* Ural. obl., kĉl pri ĉ. temoj.

K-do N. Zauŝkeviĉ, Milicejskaja 59, *Ĥabarovsk,* Siberio, kĉl pri ĉ. temoj.

K-dino E. V. Sokolova, ul. Frunze 28, Pedteĥnikumo, *Novosibirsk,* kĉl pri ĉ. temoj, L, PI, il. ĵurn., gaz. Nepre resp.

K-do Eŭgeno Sacuk, (studento 22 j.), ul. K. Marksa 37, Politeknikumo, *Minsk,* kĉl pri ĉ. temoj. Resp. garant.

K-do Eŭgeno Korsik, Staro-Meŝĉanskaja ul. 27, kv. 3, *Minsk,* kĉl pri ĉ. temoj.

— Esper-rondeto ĉe fervoja klubo koresp. kolektive k individue pri ĉ. temoj kĉl, il. gaz. Adr.: K-do V. Kuzankov, Nikitinskaja 107, kv. 5, *Samara.*

K-do G. Icekson (22 j. violinisto), Gogolevskij per. 2, *Konstantinovka,* Artemovskij okr., pri ĉ. temoj, L, PI, PK, muziknotoj, il. gaz.

K-do S. P. Ĉuĉenko (18 j. junulo), Lengorodok, V. Lugovaja 18, *Rostov (Don),* kĉl, L, PI. Nepre resp.

K-dino Nina Smidtova, *Stalingrad,* petas pardonon pro nerespondo al ĉ. Gek-doj. Dankon!

K-do K. Ĉencov (fotoamatoro), Bajkalskaja 44, *Stalingrad,* interŝ. fotokartojn nur kun fotoamatoroj. Nepre resp.

K-do Andreo Lagunov, 1-a linio, sadov, *Nalĉik,* Kab.-Balk. obl., pri lab. vivo k. a. temoj.

K-do A. Knoĥenhauer (muzikisto), Saratovskaja 30, *Stalingrad,* kĉl pri div. temoj, precipe pri muziko.

Agronomistoj, terkulturistoj atentu! — Serioze mi koresp. pri jenaj temoj: agronomio, mastrumplibonigo, terkulturo, herbejoj, konstruaĵoj, vivo de labistoj. Adr.: Bazilo Pokrovski, Braskovski t-mo *Brasovo,* Brjanska distr.

SVEDIO

— 3 svedaj K-doj koresp. kun geekstereŭropanoj pri div. temoj. Adr.: Eric Fredin aŭ N. Hansson, "Kronan", *Sumarstop,* aŭ A. Magnusson, *Bjuv.*

SVISIO

K-do Otto Hausotter (anonco en "S-ulo" de 5./7.) petas pardonon pro neresp. al ĉ. 70 ric. koresp-aĵojn. Transdoni ilin en mia loko ne eblas. Dankon!

Ne forgesu

montri la solidaron de l' tutmonda proletaro. Senprokraste sendu salutleterojn, poŝtkartojn, gazetojn, fotojn k alian materialon al la internacia leter-vespero k ekspozicio, kiun ni aranĝos por 1-a de Majo. — Ĉio estas rekompencata laŭ deziro per leteroj, il. poŝtkartoj, gazetoj, fotoj, poŝtmarkoj ktp. — Adr.: Esperanta ĉelo. Komklubo, *Omsk,* Siberio (Sovetio).

K-do R. LORENCSON (SAT-ano 1929)

salutas siajn malnovajn geamikojn k korespondantojn k sciigas al ili sian novan adreson: *Leningrad-22,* Laĥtinskaja, 32, kv. 6

ATEISTOJ!

Esp. grupo ĉe Laborista Kontraŭreligia Universitato deziras korespondi kun alilandaj liberpensuloj kaj ricevi div. kontraŭreligian materialon (afiŝojn, presaĵojn ktp.), uzotan por konstanta ekspozicio.

LENINGRAD (USSR), Ulica Staĉek, 2, Antireliozniĵ Universitet.

Studentoj de *Moskva Mekanika Lomonosov* Instituto dez. koresp. kun studentoj k laboristoj el ĉl. pri div. temoj. Adr.: (USSR), *Moskvo* 9, Blagoveŝĉenskij per. 1, Jaĉejka MOPR de Lomonosov Instituto, K-do Gr. Kaplan — Resp. garantiata.

ATEISTOJ

EMLO NTD UO T A
La 19-an de aprilo ni organizos grandan feston, dediĉotan al kvinjara datreveno de Unio de Militantaj Ateistoj. Ni petas sendi al ni multnombrajn salutojn, leterojn, poŝtkartojn, afiŝojn, flugfoliojn, ĵurnalojn, gazetojn, broŝurojn, ateistajn. — Centmilopa ateistaro de okcidenta lando atendas materialon de eksterlandaj sambatalantoj. Ĉian materialon sendu al jena adreso: (USSR), *Smolensk,* Poŝtkesto, 3, Komitato de SEU por UMA.

Gek-doj diverslandaj!

Tre dankema mi estus ricevi sciigojn pri la organizmetodoj de la malsanulejoj (medicinaj k kirurgiaj) aŭ almenaŭ de sekvantaj demandoj: Kiom longe daŭras kurso por fariĝi flegistino? Kiajn temojn, krom anatomia, oni studas? Kiom longa estas labortago? — Salajro dum la lernado k poste k pri ceteraj kondiĉoj? — Rekompence mi povas doni raportojn pri svedaj malsanulejoj. Adr.: K-dino Elma Adamson, Box 73, *Göteborg* (Svedio).

Gelaboristaro kaj junkomunistoj de l' kapitalistaj landoj — ATENTU!

La Stalina distrikta komitato de SEU, la Donbasena industria regiono, je la celoj plivastiĝi k pliprofundiĝi la internacian lab. korespondadon per esp-o k provizadi eksterlandajn laboristajn k revoluciajn organizojn per vera informaĵo pri USSR k socialisma konstruado en Sovetio,

ORGANIZIS INTERNACIAN BRIGADON POR LA INTERNACIA LABORISTA INTERLIGO JE LA NOMO ANRI BARBUSSE.

La taskoj de Intern. brigado estas jenaj: aranĝi amasan kolektivan interligon de lab. esp. organizoj de Sovetio kun la eksterl. revoluciaj-laboristaj organizoj; interŝ. ĵurnalojn, gaz., fotojn, murĵurnalojn, afiŝojn ktp., kiuj karakterizas la revolucian bataladon de l' proletaro en la kapitalistaj landoj k konstruadon de socialismo en USSR; utiligi la ricevitan materialon por loka gazetaro. — Skribu laŭ adreso: *Stalino,* Donecbaseno, Ukrainio (USSR), al "Internacia brigado" de Stal. distr. Kom-to de SEU, poŝtkesto n-o 1.

Gazetojn,

ĴURNALOJN, POŜTKARTOJN, FOTOJN

k divers. objektojn ni interŝanĝas kĉl. Korespondas kĉl pri diversaj temoj. Skribu, sendu materialon k vi nepre ricevos rekompencon deziratan.

Adr.: USSR, *Ejsk, Gogola,* 155, K-do Nesterenko Al.

ĴUS APERIS:

Paul Fruictier

Kompleta Gramatiko kaj Vortfarado de Esperanto

reviziita kaj kompletigita de

S. Grenkamp-Kornfeld

Formato: 15½×23½ cm — 200-paĝa

La plej ampleksa kaj la plej malkara el la esperantaj gramatikoj

Prezo: 5.00 fr. sv.
Kartonite: 6.50 fr. sv.

ELDONEJO: ESPERANTISTA VOĈO
Jaslo (Pollando)
HAVEBLA ĈE SAT (Mendoj el Sovetio ne plenumeblaj)

Gek-doj, Grupoj sovetiaj,

kiuj pro iu kaŭzo ne ankoraŭ estus ricevintaj kontentigan rekompencon por la afiŝoj al nia Rondo senditaj, bv. informi subskribinton per PK aŭ let. pri via kroma deziro. N. b.: Novaj proponoj por korespondi ne estas akcepteblaj. Mi deziras ricevi 3 afiŝojn en pli granda kvanto. Laŭ la deziro de la sendonto la afiŝoj estos pagitaj kontante, aŭ aliel rekompencotaj. 1. *Kolorbildo de Lenin.* Pentrita de M. A. Verdov. Moskvo. Formato 100×68 cm. 2. *Afiŝo* kun titolo: "Estu akrevidaj. Gardu akiraĵojn de la revolucio." Eldonita de Osodviahn, 1927. Glavlit n-o 98508. 3. *Afiŝo* kun titolo: "Jungŝturm." Bildo: Junkomunistino en uniformo. Kolora. Formato: 44×30 cm. Eldonita en Moskvo 1929. — Sendonte pli da ekz-oj, ne faldu, sed rulpaku la afiŝojn.

Adreso: **K-do BONESPER Ruĝamo, 350 East 81st street, NEW YORK CITY, Usono.**

KLUBO

k kluba biblioteko de Linaj fabrikoj en urbo Koĥma deziras korespondi k interŝanĝi per il. gazetoj, ĵurnaloj, leteroj ktp. kun tuta mondo. Respondo garantiata. Adr.: *Koĥma,* poŝtkesto n-o 16, Ivanovo-Voznesenskoj oblasti, al klubo de Linaj fabrikoj, USSR.

ATENTU!

Koĥma urba K-to de SEU kaj SAT dum 1-a de Majo 1930 organizas 3-an grandan Esperanto-ekspozicion en klubo de Linaj fabrikoj. Geesperantistoj el tuta mondo, sendu plej rapide salutleterojn, poŝtkartojn, gazetojn, ĵurnalojn ktp. Salutleteroj estos tralegataj dum la solenaj kunvenoj al laboristaro de nia urbo.

Faru efektive 1-an de Majo — tago de Internacio!

Adreso: *Koĥma,* poŝtkesto n-o 16, Ivanovo-Voznesenskoj Oblasti (USSR). Respondo garantiata.

Kvankam senkolora

(t. e. neŭtrala)

la gazeto ESPERANTO estas leginda ankaŭ por

SAT-ano.

ENHAVO: Scienca, Teknika, Socia, Literatura, Lingva, Esperantista, Kolektanta.

Aperas monate — 20 paĝoj.
Abono: 10 fr. svisaj.

ESPERANTO, 1 Tour de l'Ile Genève — Svislando.

Kial ili mensogas?
Kion ili celas, kriante pri persekutoj kontraŭ religio en USSR?
Respondon al tiuj demandoj vi trovos en la ĵus aperinta broŝuro:

M. SERVUD

La vero pri persekutoj kontraŭ religio en USSR. 64 pĝ. — Prezo 0.50 mk. g.

Eld. Unio de Militantaj Ateistoj kaj CK SEU. Mendu ĉe R. Lerchner, Colmstrasse 1, Leipzig O 27, Germanio; sovetianoj — ĉe CK SEU — Moskvo, Spiridonovka, 15. — Ekzistas speciala eldono por blankaj landoj.

LAB. ESP. GRUPO EN ŜVEĤAT

aranĝos 1-an de Majo esp. ekspozicion por propagandi. Esp. Gek-doj el tuta mondo, sendu multnombre PI, bfl, gaz., ĵurn. ktp. Resp. garantiata. Adr.: Joh. Hanáĉek, Altkettendorf, 10, *Schwechat b. Wien* (Aŭstrio).

Lernantoj kaj junpioniroj

de 35-a laborlernejo (35-a trud. ŝkola, str. Krapotkin, 5, *Ĥarkov*) dez. kor. kĉl. pri ĉiuj tem., pionirmovado, IRH, ateismo ktp. L, PI, PK, infangazetoj, laboraĵoj k sim. — Nepre respondas.

ENHAVO:

	paĝo
Rememoroj pri Zamenhof . . .	313—314
La politikaj partioj en Grand-Britio	315
La Kongresejo de la X-a . . .	316
En lando de senlaboreco, krizo k teroro	316—317
Diktaturo post diktaturo . . .	317
Silvio Gezel (Gesell) mortinta .	317
Esperanto-Servo	318
Sennaciula Scienc-Kultura Paĝo .	319
Tra Esperantio	320—323
Korespondado, Anoncoj	323—324

Presejo: Peuvag, Druckerei-Filiale Leipzig (Germanio)